

KRESKO 6

2018

majo

KROATA ESPERANTISTA KOLEGARARO

Davidido kaj Goliato

Cerbumante pri malforteco de Esperanto, mi ofte vidas ĝin kiel malgrandan Davidon, kiu staras antaŭ la grandega kaj senkompata mondo, giganta kaj nevenkebla kiel Goliato. La rakonto pri Davidido kaj Goliato povus al ni instrui, ke la aferoj tute neimageblaj rapide fariĝas realaj, kaj tio, kio ŝajnas tute evidenta, en sekundo kreas kiel sapveziko! Oni ne devas multe peni por trovi plurajn ekzemplojn pri tio.

Kiam mia neforgesebla kunlaboranto kaj amiko Radenko Milošević deziris ekeldoni la gazeton *Zagreba Esperantisto*, ŝajne tute natura reago de multaj esperantistoj estis: *Tio ne eblas! Oni ne povas eldonadi tiel kvalitan gazeton. Ĝi fiaskos post la dua numero!* La gazeto iasence vere „fiaskis”, sed apenaŭ post dekjara aperado kaj 33 numeroj! Kaj eĉ tiam ne pro veraj problemoj, sed nur pro la forpaso de Radenko, kiu estis ĝia motoro.

Foje oni volis organizi kroatan Esperanto-kongreson en Bjelovar. Leviĝis granda bruo de dubemuloj, ĉefe inter tiuj homoj, kiuj gvidis la enlandan movadon. Ili opiniis, ke ne eblas organizi kongreson en la urbo, kie tiutempe ne ekzistis Esperanto-societo, kaj ĉiuj timis grandan deficiton de tia aranĝo, kiun devus repagi la landa ligo. Montriĝis, ke tiu kongreso estis unu el la plej sukcesaj kaj plej bone vizititaj aranĝoj. Trompiĝis tiuj, kiuj timis pri defcito, kaj multaj agrable surpriziĝis pro la rezulto

de la kongreso, post kiu fondiĝis nova societo, kiu en la postkongresaj jaroj fariĝis la plej aktiva en Kroatio.

Male al la prikrititaj ekzemploj, kelkaj samideanoj kredis, ke esperantistoj por ĉiam ricevdos sumegojn da mono el la ŝtata kaso kiel dum pluraj jardekoj en la socialisma epoko. Evidentiĝis, ke la afero fiaskis subite kaj altrudis al ni serĉi novajn vojojn. Dum tiu serĉado renversiĝis ankaŭ la divastiĝinta opinio de manpleno da niaj gvidantoj, ke nur en grandaj urboj oni povas havi sukcesan Esperanto-agadon, ĉar niaj aktivuloj en la provinco estas malmultaj kaj nesufiĉe kapablaj! Oni opiniis, ke nur la forta landa ligo estas garantio de nia sukceso, sed jen montriĝis ke multe pli utilas la laboro de pluraj Davididoj en la provinco, ol de la laciĝinta Goliato.

Vi, malgrandaj Davididoj, kiuj laboras ĉie laŭ via povo, kiuj obstine aldonas vian kontribuon al nia movado, ne atendante laŭdojn kaj laŭrojn, estas la vera trezoro de Esperantujo. Se viaj postuloj estas limigitaj kaj realaj, vi certe atingos ilin. Sed ne postulu, ke la tuta mondo parolu Esperanton, ĉar tio estas ekster nia povo. Ni ne altrudu nian lingvon al neesperantistoj, sed ni kreu la atmosferon, en kiu ili mem demandos nin pri Esperanto. Kaj antaŭ ĉio, ni estu moderaj kaj senideologie prezentu nian laboron. Agante tiel, vi same kiel Davidido venkos Goliaton! Konsideru, ke venko okazas ne ĉiam pro la forto, sed plej ofte pro la kuraĝo!



Ekskursu kun ni sur la rivero Kupa!

La rivero Kupa en Kroatio konatas inter esperantistoj pro la Esperanto-boatado, kiun jam dek jarojn organizas Esperanto-societo Sisak. Ĉar tiu aranĝo, kun loĝado en tendoj, taŭgas nur por aventuruloj, kelkaj esperantistoj demandis, ĉu eblus organizi pli komfortan ekskurson sur tiu rivero. Nun ni klopodas plenumi tiun deziron kaj invitas vin kaj viajn amikojn kaj familianojn partopreni agrablan turisman ekskurson en la regiono de Kupa!

La **29-an de julio 2018**, ni planas organizi tuttagan ekskurson, pri kiu pli detale legu ĉi-sube.

Programo:

6h00 – Starto de buso el Dokumenta Esperanto-Centro en Đurđevac, Bana Jelačića 138A, kiu organizas la ekskurson.

6h30 – Starto de buso el Bjelovar, el la parkejo ĉe Trg hrvatskih branitelja.

7h20 – Starto de buso el Vrbovec, el la parkejo de la Hotelo *Bunčić*, Zagrebačka ulica 4. Pri loko por enbusiĝo de eventualaj ekskursantoj en Dugo Selo kaj Sesvete, ni informos vin poste.

8h30 – Starto de buso el Zagrebo, el la parkejo por turismaj busoj antaŭ la Ĉefa fervoja stacidomo (*Glavni kolodvor*), Trg kralja Tomislava 12.

9h30 – Alveno al **Karlovac**, kiu situas je 53 kilometroj de Zagrebo kaj havas la epiteton de *urbo sur kvar riveroj*. Efektive, la urbon trafluas la riveroj Korana, Kupa, Dobra kaj Mrežnica.

10h00 – Vizito al la dolĉakva akvario *Aquatica*, Branka Ĉavlovića Ĉavleka 1a. – Kroatio estas unu el la eŭropaj landoj, kiuj havas tre riĉan dolĉakvan flaŭron kaj faŭnon, kaj Karlovac, kiu kuŝas sur kvar riveroj, estas la plej bona loko por prezenti tiun riĉaĵon. La dolĉakva akvario, kiu en Karlovac estis establita helpe de Eŭropa Unio, prezentas 100 fiŝspeciojn kaj 40 endemojn. Ĝia celo estas fortigi la senton pri la naturaj diverseco kaj riĉeco de la regiono. La vizito al la akvario estas fakultativa, kaj la kosto de la enirbileto ne estas inkluzivita en la koston de la aranĝo. Se almenaŭ 20 el niaj ekskursantoj vizitos la akvarion, ni rajtas ricevi grupan bileton je 40,00 kunaoj je persono (cetere ĝi kostas 60,00 kunaojn).

11h00 – Vizito al la kastelo **Dubovac**, kiu troviĝas en la samnoma urbokvartalo de Karlovac, je 185 metroj super la marnivelo. Ĝi devenas el la periodo antaŭ la 13-a jarcento kaj estas unu el la plej bone konservitaj feŭdaj konstruaĵoj en Kroatio.

Post la vizito al Dubovac, ni direktiĝos al la vilaĝo **Brođani**, kuŝanta sur la dekstra bordo de la rivero Kupa, de kie startos nia ŝipa ekskurso.

12h00 – Starto de la ŝipekskurso el **Brođani**. – Helpe de Eŭropa Unio estis konstruita repliko de iama grentransporta ŝipo, kiu sub la nomo *Zora* nun transportas turistojn sur la rivero Kupa. La vojaĝo estas instrua pri la regiono kaj ĝiaj vidindaĵoj kaj daŭras 90 minutojn. Post la ŝipado ni revenos en la haveneton de Brođani, kie atendos nin la buso kaj veturigos nin al la bieno **Gliboki Brod**, posedata de la familio Marinković

15h00 – Tagmanĝo en **Gliboki Brod** – La familio Marinković preparos por ni tagmanĝon, kiu konsistas el aperitivo (frukta brando kaj likvoro), ĉefa plado (rostita kapridaĵo kun spicherboj, rostita kokidaĵo kaj medalionoj el miksitaj viando, terpomoj, sezona salato, hejme bakita pano), deserto (tradicia kuko el maizfaruno kaj laktokremo, farĉita per fromaĝo kaj pomskrapaĵoj, nomata *paglamača*) kaj kafo. Ni havos la eblecon konatiĝi ankaŭ kun ilia bredejo de kaproj, vidi la melkadon kaj nutradon de la bestoj, observi la kortobirdaron kaj eĉ rajdi ĉevalojn.

18h00 – Reveno – Post agrabla ripozo, ni planas fini nian ekskurson kaj revojaĝi samvoje al Zagrebo kaj aliaj lokoj.

Prezo:

- Por infanoj kaj pensiuloj: **230,00 kunaoj**
- Por laborantaj plenkreskuloj: **280,00 kunaoj**

La prezo estas kalkulita je minimume 40 personoj kaj ĝi inkluzivas: busvojaĝon, enirbileton por viziti la kastelon Dubovac, bileton por veturado sur la ŝipo *Zora*, tagmanĝon en la bieno Gliboki Brod kaj vojaĝasekuron.

La prezo ne inkluzivas: enirbileton por la akvario *Aquatica* en Karlovac.

Pliaj informoj ĉe J. Pleadin 098/248 574.



Rezervu vian lokon ĉe: dec.kroatio@gmail.com

El Litomiŝlo en la mondo

Kvankam pensoj turniĝas al **Karolo Piĉ**, kiam oni pensas pri la Praga skolo, tio estas vero, ke li ne estas la plej reprezenta skolano. Inter tiuj elstaras **Jiří Karen** (1920-2000) kun la poemaro *Flugilhava ŝtono* (1985); **Eli Urbanová** (1922) kun 5 poemaroj – *Nur tri kolorojn* (1960), *El subaj fontoj* (1981), *Verso kaj larmo* (1986), *Vino, viroj kaj kanto* (1995) kaj *Rapide pasas la temp'* (2003) – al kiuj aldoniĝas ŝia fama, skandalema biografia romano *Hetajro dancas* (1995) kaj **Josef Rumler** (1922-1999) kun la eseoj *Abunde kaj redunde* (1986), kiu donis la idean skeleton por la tuta skolo.

Karolo Piĉ naskiĝis la 6-an de decembro 1920 en Litomiŝlo. En tiu ĉi urbeto li pasigis ok jarojn, vizitante la lokan gimnazion. Kiel 17-jarulo li ekkonis Esperanton kaj decidis iĝi verkisto esperantista. La plej ŝatata celo por liaj migradoj estis la Litomiŝla tombejo, kiu junaĝe allogis lin per ia mistera ĉarmo, meditiga silento kaj reviga kvieto. Post la abiturienta ekzameno li iris al Prago, kie en la Karola Universitato li elektis filozofion je studobjekto. Bedaŭrinde liajn studojn interrompis la invado de germanaj trupoj en 1939. Baldaŭ poste la nazioj fermis ĉiujn universitatojn. Oni likvidis ankaŭ la esperantistan movadon. Kun kelkaj libroj, aĉetitaj dum la fermo de la Esperanto-asocio, Karolo Piĉ revenis al Litomiŝlo, kie li enskribiĝis al studoj en la Pedagogia Instituto. Ankaŭ ĉi tie li ne restis longe. Li estis vokita al devigaj laboroj apud la urbo Most. Poste oni arestis lin, ĉar li plilongigis la forpermeson por zorgi pri sia mortanta onklino. Li devis labori pune, tiam li renkontiĝis kun persekutado, vipado, malsato kaj morto. Kaptinte pulmiton, longe li kuŝis en malsanulejo, kaj la militofino kaptis lin hejme en Litomiŝlo. Li eklaboris kiel librotenisto en la distrikta oficejo de sia familia urbo, kaj poste dum ses jaroj en la urbeto Poliĉka. En tiu ĉi tempo li aktiviĝis en la Esperanto-movado.



Tra konata samideano **Tomaš Pumpr** li ekligis korespondadon kun **Waringhien, Régulo Perez** kaj **Lapenna**.

Post 1948 komenciĝis arestadoj, minacado, amasa kondamnado al malliberigo kaj morto, kiam la ĉefaj komunistoj ekprenis regadon. Iliaj persekutoj tuŝis ankaŭ esperantistojn kaj ilian movadon. Por vivteniĝi Karolo Piĉ laboris dum kelka tempo kiel farbisto de fenestroj kaj pordoj en Litomiŝlo, ĝis kiam amiko-esperantisto helpis al li enposteniĝi kiel kontisto en la komunista urbestrejo.

Karolo Piĉ ne ĉesigis sian aktivadon por la Esperantomovado. Li kunlaboros per artikoloj kun Esperanto-gazetoj, kaj precipe kun *Literatura Mondo* kaj *Nica literatura revuo*. Nur fine de la 1960-aj jaroj li povis forveturi el la lando kaj partopreni la Universalajn Kongresojn en Madrido (1968), Vieno (1970) kaj Portlando (1972). En 1972 li iĝis akademiano. En la gazeto *Starto* li publikigis aron da eseoj: *Por la Zamenhofa Esperanto*, *La popola karaktero de Esperanto*, *La scienc-teknika karaktero de Esperanto*, *La 15-a regulo*, *La greka anatemo*, *Superstiĉo de internacieco*. Precipe en tiuj lastaj li kritikis akceptadon de internaciaj derivaĵoj. Li estis kontraŭ latinigado kaj grekigado de Esperanto per internaciismoj devenantaj el ambaŭ lingvoj. Li

kvazaŭ malderivis kaj malkombinis la Esperanto-vortojn, kiuj originas el la latino, ekz. de la vortoj *inkludi* kaj *ekskludi* li disigis ilian radikon *kludi* kaj derivis la purajn Esperanto-variantojn *enkludi* kaj *elkludi*. Tiel komenciĝis la Piĉa vojo al la propra idiolekto (individa variaĵo de lingvo), en kiu li verkos siajn postajn verkojn.

Rekonante nesufiĉon de Esperanto en priskriboj de montaro kaj altaĵoj, li uzados anstataŭ la tradiciaj *monteto*, *monto*, *montego* la neologismojn kiel *hilo*, *kolino*, *kumulo*, *pinto*, *glaciso*, *siero*. Li riĉigis sian lingvaĵon per amaso da novaj vortoj, kiel *hati* (malami), *verberi* (pune bati sen indiko de batilo), *vabanko* (facilanima decido), *kipo* (ŝutamaso), *hunti* (kurigi, rapidigi), *hurti* (abrupti, bruski), *forniki* (malĉaste seksumi). Ofte li enkondukos ĉefismojn: *obtirado* – slangaĵo kun la signifo *prifiki*, ankaŭ *preni nanon* (drinki glaseton da forta brando), *ĉiĉo* (katino kaj metafore knabino), *buĥto* (ĉeĥa rektangula kuko, metafore knabino kaj ŝia vulvo). Atakojn kontraŭ Piĉ elvokis tiuj ŝanĝoj, kiuj modifas la Fundamenton. Estas vortoj sen finaĵo (adverboj, konjunkcioj) kaj novaj afiksoj: *ak* (plifortigita kaj) *aŭtem* (sed, tamen, ja), *enim* (nome), *erst* (ne pli frue ol, nur), *forsin* (eble), *graŭ* (ĝuste tiel), *ĝus* (ĝuste tiam), *mej* (malplej), *men* (malpli), *nam* (ĉar, pro tio, nome), *nelge* (antaŭ nelonge), *nok* (ankoraŭ), *olim* (jam antaŭ longa tempo), *sovente* (ofte).

Atakata, nekomprenebla, iafaĵe mokata Karolo Piĉ verkis ĉefe por la tirkesto. La rompo de silento ĉirkaŭ li estis la plej fama aŭtobiografia romano *La litomiŝla tombejo* (1981), kiun aperigis Reinhard Haupenthal. Kun granda zorgemo en la Haupenthala eldonejo Iltis la tagan lumon ekvidis pliaj verkoj de Piĉ: la poemaroj *Angoro* (1982) kaj *Obsedo* (1984), la romanoj *La mortsonorilo de Chamblay* (1983), *Klaĉejo* (1987) kaj *Ordeno de verkistoj* (1997), la novelaro *La Bermuda triangulo* (1989) kaj du esearoj *La interna vivo de*

Esperanto (1995) kaj *Kritiko kaj recenzistiko en Esperanto* (1999). Multaj aperis jam *post mortem*, ĉar ilia aŭtoro forpasis la 15-an de majo 1995.

La *litomiŝla tombejo* estas historio pri la vivo de viro (Piĉ), ekde infanaĝo ĝis maljuniĝo. Per liaj rakontoj oni malkovras travivaĵojn el la lernejoj, universitataj studoj, dum milita restado en punlaborejo, profesia aktivado kaj esperantista agado, sed antaŭ ĉio ni intimiĝas kun liaj seksaj revoj kaj spertoj, el kiuj multaj ŝajnas nur puraj fantaziaĵoj. Ekde la unuaj paĝoj ravas priskriboj kaj rakontfluoj. Per malmultaj frazoj Piĉ kreas lertege kaj verve la etoson, en kiu svarmas objektoj, forgesitaj odoroj, aromoj, koloroj, gustoj. Jen kun kia majstreco li desegnas la bildon de sia infanaĝa hejmo:


Aĝa domo sur la placo. Jen via plej malnova rememoro. Aĝa domo kun longaj, malhelaj koridoroj kaj ŝtuparoj. Vi tre timis ĉiam, kiam vespere vi devis iri tra ili sola. Aĝa domo kun kvadrata korto, kun granda, vitrumita ateliero de fotisto, kaj kun longa, mallarĝa ĝardeno tro streta kaj kvazaŭ kunpremita. En tiu ĝardeno kreskis nur kelkaj arboj kaj preskaŭ nenia herbo, kaj ĉiam ĝi estis iel neglektita kaj dezerta, nezorgata kaj malgaja.

Sed en la domo estis eĉ vasta subtegmento kun multa fatraso kaj kun kestoj, kofroj, ŝrankoj kaj aliaj ujoj, el kiuj ĉiu enteris aventuron kaj surprizojn.

[...]

Estas vespero. La lampo brulas. Tra ĝia blanka kloŝo filtriĝas trankviliga flava lumo. La patrino portas tablen panon kaj vaporantan supon. Kaj la ĉambro aspektas preskaŭ feste kaj solene. (p. 14-15)

En la priskribojn de la vivojaroj fojfoje enŝteliĝas observoj de virinaj mamoj, ventroj, femuroj, koksoj, pugo. Tiuj virinoj nudigas sin aŭ estas nudigataj. Precipe logas kaj samtempe timigas la protagoniston vulvoj:



Virina vulvo tie krias pri la vira spermo. Ĝi petas. Ĝi logas kaj persvadas. Ĝi soifas. Longegaj tremoj kaj ondado. Ŝia sino jukas kaj frenezas. Ŝia sino estas kratero, kretacea maro, varma vivgenera buljono. Ŝi ardas kaj pasias. (p. 92)

En la scenoj de seksumado aŭ sinmasturbado Piĉ montras nesupereblan speкто-kapablon. Liaj priskriboj surprizas per ia senbrideco, eĉ besteco, kion spronas la intenseco de volupto, ardo kaj urĝo:

Kaj hejme ŝi sin masaĝas. Ŝi detiras la tolaĵojn. Ŝi metas sin kanapen. Sub sin ŝi kunĉifas kusenon aŭ alian molaĵon. Kaj poste ŝi sin rulas. Lantritme, regule ŝi premadas la vulvon al



la kunvolvaĵo. La klitorio brulas, jukas kaj rigidas. La buĥtino ŝvite malseketas kaj humidas, ĝis ĝi ne eltenas tion plu. Ema elfleksas sin. Kaj la vulvo ekcukiĝas... Kvinfoje, dekfoje, dekkvinfoje sinsekve. Ema henas kaj ĝemas, aĥas kaj hoas, distiras la femurojn, saltetas sur la volvaĵo, levas la kruojn tiel, ke kalkane ŝi preskaŭ tamburas la spasmantan pugon... Kaj, anhelante, ŝi restas kuŝi dissternita... (p. 140)

En la romano ne mankas ankaŭ komikaj kontrastoj. Ili malkovras ĝis la medolo la vivon de la protagonisto, kiu certe estas Piĉ:

Sur la lago glitas barko. Akvo plaŭdas. En la barko sidas Libuŝa kaj vi. Libuŝa havas blankan veston kaj nenion sube. Kaj en la krepusko vi ne plu distingas, kio estas tolo kaj kio karno kaj korpo, kio nigra ombro kaj kio la nigro de la sino... [...]

Sed... Por la Kolegio vi verkis ak aron da studoj kaj prelegoj. Esperantaj neologismoj. La supersignitaj literoj en Esperanto. (p. 115)

Fascina subventro kun malhela densaĵo de la sino. Harumita virinorgano. Certe ŝi estas sola. Certe ŝi ne havas viron. Certe ŝi ĝemas sub vipoj de pasio kaj knutoj de avido. Kaj certe ŝi elmontras kaj elponas sin intence. Por parlogi iun...

Sed vespere vi estas hejme kaj gluas verson al verso kaj metas rimon al rimo. Doktoro Pumpr vin instigas. Kaj viaj unuaj poemoj komencas aperi en Esperanto-revuoj. (p. 120)

La *litomiŝla tombejo* malbridas plej kontraŭajn sentojn ĉe leganto: de abomeno, furiozo ĝis admiro kaj raviteco. Certe ĝi estas verko grava, unu el la mejloŝtonoj de la Esperanto-literaturo.

Krome valorus aldoni, ke samkiel *Metropoliteno* de Vladimir Varankin *La Litomiŝla tombejo* estas ankaŭ romano pri la verkado de romano.

Tomasz Chmielik

Avino Matilda (originala rakonto)

Avino Matilda – tiel nomiĝis la patrino de mia patro. Matilda. Nomo malnovmoda, ĉu ne? Sed tre trafa por oldulino, por malnovmodulino, kia estis mia avino.

Nia familia domo troviĝas ĉe la periferio de la urbeto surinsula kaj apudmara. Ĝi estas impona domo duetaĝa, kun pluraj ĉambroj sur ĉiu etaĝo, kun kromdometoj en la vasta korto, terasaj ĝardenoj kaj vinberlaŭboj. Konstruis ĝin fine de la pasinta jarcento mia onklo, pastro, kaj mia avo per la ŝparaĵo akirita dum kelkaj laboro en Peruo.

En tiu fora lando kun mia avo vivis ankaŭ mia avino. Ŝi naskis tie du infanojn, sed post mallonga tempo ili ambaŭ mortis, ne povante elteni – laŭ diro de kuracisto – la tiean alteklimaton. Por konservi posteularon al si, miaj geavoj post pluraj jaroj revenis al sia adriatika hejmlando, kie la postaj du infanoj prosperis.

El Peruo ili kunportis memore diversajn interesajn objektojn, kiuj ĉiam altiris la atenton de gastoj kaj ni infanoj, des pli ĉar la avino scipovis interese rakonti historiojn pri ili.

Kvazaŭ omaĝe al siaj mortintaj „du anĝeloj”, la avino postrevene al la hejmlando findecidis ne viziti la urbon, sed pasigi la reston de sia vivo hejme kun siaj domanoj. Kvankam pia, la urbon ŝi ne vizitadis eĉ dimanĉe, kiam la loĝantoj, precipe ŝiaj samaĝulinoj, kutimis regule viziti la meson. Aŭdinte la sonorilojn kiuj anoncis diservon, ŝi mem faris sian kristanan devon hejme, antaŭ la granda bildo de la Dipatrino.

Pleje restis en mia memoro la dimanĉaj posttagmezoj, kiam ĉiuj domanoj forlasis la hejmon. Iuj iris promeni, la avo kartludi en la urba restoracio, kaj mi restis sola kun ŝi „por gardi ŝin”. Tial mi estis ŝi dorlotito, kaj ŝi estis plej multe mia, mia avino Matilda.

Kiam pro iu mia petolaĵo mi ricevis batojn de mia patrino, aŭdinte mian ploron, la avino subite alkuris kaj sen antaŭa


esploro kio okazis, superŝutis per insultoj sian filinon kaj mian patrinnon.

– Senkompatulino! Krue-lulino! Ŝtonkorulino! Kiel vi povis bati mian gardanĝelon? Hontu!

Kaj post tio ŝi kutimis turni sin al mi per tre mildaj vortoj:

– Venu, venu nur al mi, mi protektos vin de tiu – senkorulino!

Kaj vere ŝi protektis min, altirante min al siaj brakoj.



Aleksandar Kuček: *Atendado*, 1964 (Muzej za umjetnost i obrt, Zagreb)

En la postaj jaroj, en la dormoĉambro de la geavoj, plej altira por mia scivolema okulo fariĝis la tirkestoj de la malnovmodaj komodo kaj skribotablo. Al mi kiel infano, tiuj tirkestoj ŝajnis io plej mistera en la mondo. Neniam mi kuraĝis sola eniri la ĉambron kaj eltiri ion el la tirkestoj, sed mi helpis al la avino, kiam ŝi dum dimanĉa posttagmezo pene elritis la tirkestojn por trovi

ian rekompencan por mi: nukson, moneron aŭ ion alian. Estis vere etaj, sed tiel grandaj kaj karaj doncoj!

Mia avino scipovis rakonti tiom multe da historioj kaj fabeloj, ke estis plezuro ŝin aŭskulti. Kun ŝi en la tombon estas enterigita tuta neskribita popola literaturo pri feinoj, koboldoj, koŝmaroj kaj sorĉistinoj. Ŝi rakontis, ke iam ŝi aŭdis kaj vidis ilin tie aŭ aliloke propraokule. Eble la avino rakontis al ni infanoj tiajn, kelkfoje harstarigajn historiojn tial, ke ni dumnokte ne vagadu, ke ni post noktiĝo estu en la hejmo, ĉar – ŝi kutimis diri – la nokto estas por sidi en la hejmo kaj por – iri dormi.

Mia avino mortis antaŭ mutlaj jaroj. Sen malsanetado, sen suferoj, per plej agrabla morto, kian oni povas imagi: dum la dormo en la lito. Vespere ŝi enlitiĝis, kaj matene ŝia kutima kanto, per kiu ŝi anoncadis al la domanoj sian vekigiĝon, ne plu aŭdiĝis. Ŝia koro ĉesis bati por ĉiam. Por mi ŝi nur duone mortis.

Mi tiel vive vidas ŝian figuron ankaŭ nun sidantan sur ŝia seĝo, kurbiĝintan, kun malhelbruna kaptuko sur grizhara kapo, sulkigita vizaĝo kaj elstaranta mentono, el kiu kreskas nigra veruko kun tri grizaj viloj, kaj kun manoj tuberplenaj kiel maljuna vinbertrunko.

Ĉiujare kelkfoje mi vizitas „mian” insulon, kie sur pitoreska duoninsuleto kuŝas antikva urbeto kiel io fabele bela, ĵus elmariĝinta. Kaj revenante al la kontinento, ju pli la ŝipo malproksimiĝas de ĝi, des pli malgranda fariĝas la nestoforma urbeto. Kaj fine ĝi transformiĝas en punkton, por ke tiel malgrandigita ĝi povu pli facile resti en la pupilo de mia okulo kaj nestiĝi en la koro. En tiu nesto vivas ankaŭ mia avino.

Marinko Gjivoje

MARINKO GJIVOJE (1919-1982) estis konata kroata historiisto de Esperanto, ĵurnalisto, leksikografo kaj bibliografo, redaktoro de pluraj Esperantaj gazetoj kaj la unua profesia esperantisto en Kroatio, al kiu estis dediĉita la kvara prelego el la serio *Forgesitaj samideanoj*, okazinta en Zagrebo la 5-an de majo. Estas relative nekonate ke li verkis ankaŭ beletron. En la arkivo de Dokumenta Esperanto-Centro en Ĝurđevac ni trovis tajpaĵon de lia rakonto *Avino Matilda*, kiun ni publikigas omaĝe al multflanka aktivulo Marinko Gjivoje, okaze de lia mortodatreveno. Li forpasis la 31-an de majo 1982.

Interesa verko de grava aŭtoro

En 2014 ĉe *Grafokom* en Ĝurĉevac aperis redaktita kaj korektita libroforma represo de artikoloj el la rubriko *Esploro kaj Dokumentado*, aperinta en la revuo *Horizonto* (1976-1987). Pri tiu libro José Antonio Vergara el Ĉilio verkis recenzon por la 34-a numero de *Zagreba Esperantisto*, kiu efektive neniam aperis. Kun la afabla permeso de la recenzinto, publikigas ĝin la redakcio de *Kresko*.

En la antaŭparolo, kiun Ivo Lapenna skribis por sia verko *Kritikaj studoj defende de Esperanto*, eldonita en lia lasta vivojaro (1987), li konstatis ke „ĉe la plej valora artikolo aŭ studo publikigita en iu periodaĵo rapide forgesiĝas. Male, libroj havas multe pli longan vivon. Ili restas sur la librobretoj en privataj hejmoj, troviĝas katalogitaj en bibliotekoj kaj povas esti ĉiumomente konsultitaj. Tial mi decidiĝis publikigi libroforme kvar tekstojn, kiujn miaj geamikoj en la neŭtrala kaj sendependa Esperanto-movado kaj mi mem rigardas speciale gravajn el historia kaj aktuala vidpunktoj en la Jubilea jaro.”

Preskaŭ 27 jarojn poste, verŝajne simila zorgo inspiris lian vidvinon kompili kiel libron la tutan kolekton de artikoloj verkitaj de Ivo Lapenna por la rubriko *Esploro kaj Dokumentado* (ED) de la revuo *Horizonto*, inter la jaroj 1976 kaj 1987. Tiu ĉi elegante blua volumo (altkvalita papero, malmolaj kovriloj), estis eldonita omaĝe al la 60-jara datreveno de la historie grava Rezolucio pri Esperanto, akceptita dum la Ĝenerala Konferenco de Unesko en Montevideo, Urugvajo, 1954.

Tra la paĝoj de la nuna libro oni trovas la vervan, nelaciĝeblan Lapenna, pri kiu ĉiu nova generacio de esperantistoj lernas, i.a. danke al la energia agado konserve al kaj diskonige de liaj memoro kaj atingoj, kiun daŭre entreprenas s-ino Birthe Lapenna kaj ŝia *Fondaĵo Ivo Lapenna* (Kopenhago).

Jam en la komenco Ivo Lapenna difinas la karakteron de la rubriko: en ĝi „regule aperados tre koncizaj informoj pri la plej ĉefaj aspektoj de la lingva problemoj

kaj pri la plej esencaj dokumentoj rilate la Internacian Lingvon” (p. 14). Kelkajn jarojn poste, li denove klarigas ke ED „objektive prezentos gravajn eventojn, atingojn kaj malsukcesojn lige kun la Internacia Lingvo kaj tiele daŭre kompletigados la verkon **Esperanto en Perspektivo: Faktoj kaj analizoj pri la Internacia Lingvo**” (p. 108). Laŭ tiu kompreno, je la fino de pluraj el la 102 unuopaj artikoloj kompilitaj por tiu ĉi libro, la aŭtoro gvidis la legantojn ĝuste orientiĝi al tiu verko kies ĉefredaktoro li estis, per la sistema formulo „tiu ĉi ero kompletigas ĉap. de *EeP*”.

La deklarita, ĉefa celo de la rubriko estas do „plenigi la ekestintan vakuon”, kiun naskis tio kio laŭ la drasta diagnozo de Lapenna estis la „malapero de *CED*” (p. 13), t.e. de la Centro de Esploro kaj Dokumentado pri la Monda Lingvo-Problemo, fondita ĉe UEA en 1952. Li asertas ke, „rezulte de la hamburgaj eventoj ankaŭ *CED* ĉesis funkcii” kaj ke „tio, kion la nuna gvidantaro de UEA ankoraŭ nomas *CED*, estas ne nur kontraŭa al la strukturo, celoj kaj realigoj de la originala *CED*, sed ankaŭ grave danĝera por la interesoj de la Internacia Lingvo” (p. 13).

La sama, firme polemika tono plurfoje renkonteblas tra la tuta verko, ĉar la aŭtoro insiste sin referencas al la „iama *CED* (1952-1974)” (p. 141, 183), aludas al la „fakta malapero de *CED*” (p. 141) aŭ al tio ke „*CED* ne plu ekzistas” (p. 152). La terminoj „ĝishamburga *CED*” kaj „antaŭhamburga *CED*” estas troveblaj almenaŭ 11 fojojn en la libro, ofte kun la aldono ke ĝi „escepte de la nomo, havas nenion komunan kun la nuna *CED*” (p. 63) aŭ kun la „surpapera *CED*”



(p. 134). Fakte tuta artikolo el la serio estas kolere kritika al „*CRD kontraŭ CED*” (p. 183-186), t.e., al la agado de la Center for Research and Documentation on World Language Problems (CRD) pro la produktado de „*neutiligeblaj materialoj*”, pro tio ke por tiu nuna CRD, kontraŭe al la iama CED, „*Esperanto ne ekzistas*”, kaj pro la „*intelekta malhonesteco*” de ĝiaj respondeculoj.

Fakte, tra la tuta artikol-serio klare percepteblas tri ĉefaj aksoj, nome

a. la profundaj vundoj de la homo Ivo Lapenna pro la efiko de la „*hamburga partipolitika puĉo*” (p. 209) kaj la „*antaŭhamburga partipolitika komploto*” (p. 124), kiujn li indigne denuncas plurloke en la libro;

b. lia serioza zorgemo pro tio kion li diagnozas politika kompromitiĝo de UEA kaj TEJO mem, kondukantaj ilin al submetiĝo al la soveta monda strategio;

c. lia daŭra atento al la evoluo de UEA, kaj lia senkompromisa sinteno pri la ĝusta maniero informi pri Esperanto kaj pri la rolo kiun ĝi devus ludi en la mondo.

Tiel, tra la tuta verko senteblas la peza etoso de la fina fazo de la Malvarma Milito. Ekzemple, la aŭtoro tre atente sekvas kaj analizas kelkajn eventojn ligitajn

al Esperanto en la orienteŭropaj landoj tiam „socialismaj”, kaj do troveblas artikoloj pri persekutoj kontraŭ esperantistoj en la tiamaj Ĉeĥoslovakio kaj Sovetunio, pri puĉo en Pola Esperanto-Asocio, pri poŝtaj konfiskoj de E-revuoj en GDR, ktp. Li detale kaj tre kritike okupiĝas pri la kunlaboraj rilatoj kaj de UEA kun la „sovetiisma” Mondpaca Esperantista Movado (MEM), ĉar filio de la sovetia frontorganizaĵo Monda Packonsilantaro, kaj de TEJO kun la Monda Federacio de Demokrata Junularo, kiu estas „instrumento de porsovetia propagando”. Estas rimarkeble kiel atente li sekvis la evoluon de la „posthamburga UEA”, pri kiu estas diversaj artikoloj analizantaj i.a. raportojn de la estraro, ĝian finanĉan staton, ĝiajn membronombrajn statistikojn.

En la verko aperas longa eseo kritike recenza al la verko *The Esperanto Movement* (1982) de Peter G. Foster, kiu jam enestis la ĉi-komence menciitan libron de Ivo Lapenna (*Kritikaj studoj defende de Esperanto*). Krom pluraj aliaj interesaj eroj, la verko ankaŭ enhavas gravan, detalan materialon sub la titolo „Konfidenca dokumento pri la agado en Montevideo”, kompilitan de f-ino Marianne Vermaas surbaze de la raportaj leteroj kiujn Lapenna sendis al tiama prezidanto

de UEA E. Malmgren. Temas pri tre riĉa kolekto de impresoj, faktoj, ideoj kaj travivaĵoj, per kiuj preskaŭ ĉiutage li raportis pri sia montevidea aventuro, foje entuziasme, foje kolere pro frustrigo. Estas vere kortuŝe kiel li anoncas la neatenditan venkon per letero datita la 10-an de decembro 1954, skribita „kun tremantaj manoj kaj malsekaj okuloj”...

La libro estas do riĉa fonto de informoj, kiu estos utila al ĉiu kiu interesiĝas pri la historio de UEA kaj la Esperanto-movado dum tiu epoko. Kvankam la kompilintoj provizis detalajn enhavtabelon kaj nomindekson, bedaŭrinde ne estas indikoj pri la numeroj kaj datoj de la revuo *Horizonto* en kiuj la unuopaj artikoloj estis publikigitaj. Estus konsilinde konsideri por eventuala dua eldono la aldonon de klarigaj notoj, ĉar ekzemple kelkaj duboj de la aŭtoro pri tio ke „ne estas klare ĉu Korea Esperanto-Asocio apartenas al Norda Koreo [Norda Koreio] aŭ al Suda Koreo [Suda Koreio]” (p. 53) aŭ ke „ŝajnas, ke ankaŭ tiu serio [Oriento-Okcidento] estas ĉesigita” (p. 72), estus tre facile precizigeblaj.

La lingvaĵo estas, kiel ĉiam ĉe Lapenna, klara kaj eleganta. Interese, li uzas la vorton *komunaĵo* por nocio kiun oni nuntempe kutime esprimas per *komunumo*: *esperantlingva*

komunaĵo (p. 168), *naciaj lingvokomunaĵoj* (p. 170). Li eĉ eksplicite admonas en sia artikolo n-ro 70 kontraŭ la uzo de la vorto *komunumo* ĉe la nomo de la tiam *komunumo* ĉe la nomo de la tiam (1982) ekzistanta organizaĵo EEK (Eŭropa Ekonomia Komunajo). Mi trovis kelkajn mistajpojn (ekz. *helplingoj* anstataŭ *helplingvoj* en p. 207), sed ili ne ĝenas la legadon.

Legante tiun ĉi libron, oni ne povas ne miri pro tio ke, tre baldaŭ post la forpaso de Ivo Lapenna, ĝia mondpolitika kunteksto funde, komplete ŝanĝiĝis ĝis nerekonobleco. Tiu jardekojn daŭra, dubloka monda ordo kiun li tiom funde konis kiel fakulo pri juro kaj internaciaj rilatoj, renversiĝis je neatendita rapideco. La Berlina Muro dramece disfalis, Sovetunio ne plu ekzistas kiel ideologia superŝtato kaj MEM kviete estingiĝis.

Per la tekstoj entenataj en tiu ĉi libro oni povas konstati ke Lapenna restis ĉiam fidela al siaj konvinkoj, ĝis sia fina spiro. En la lasta artikolo de tiu ĉi kolekto, kiu citas la numeron de marto 1987 de *Esperanto*, li aprobe mencias s-ron Mark Fettes kiel „novan, talentan redaktoron de la revuo” (p. 210). Nu, tiu homo estas la nuna prezidanto de UEA, kaj do posteulo de Ivo Lapenna mem en la ĉefa rolo de la Esperanto-movado.

José Antonio Vergara

Studu Esperanton en Ĉinio

Kun la permeso de Ĉina Ministerio de Edukado, Zaozhuang-a Universitato, kie troviĝas la plej granda Esperanto-muzeo en la mondo, iniciatis kvarjaran studan Esperanto-fakon kun literatura bakalaŭro, dum kiu la studentoj studos ankaŭ la anglan kaj ĉinan lingvojn, interretan komercadon kaj amaskomunikadon. En junio la universitato komencos varbi studentojn el la tuta mondo. Al studentoj el neevoluintaj landoj la universitato proponos stipendiojn.


Intersiĝantoj kontaktu kun sinjoro Sun Mingxiao: Semio@163.com

Estas bonvenaj esperantistaj profesoroj kaj instruistoj, kiuj povus instrui la anglan kaj Esperanton. Tiuj, kiuj povus instrui aliajn lingvojn aŭ fakojn, estos rekomendotaj al koncernaj fakaj institutoj.



Esperanto-Muzeo en Zaozhuang-a Universitato

Legita en la Esperanto-sumoo



Bolesław Prus: *La Pupo*; 659 paĝoj kun notoj, fotoj kaj Postparolo; esperantigis Tomasz Chmielik; Pola Biblioteko volumo 20; eldonita en 2016 kunlabore de Podlaĥia Biblioteko, Libro-Mondo kaj Dokumenta Esperanto-Centro (Ĝurđevac, Kroatio).

La dika kaj riĉa triparta romano *La Pupo* estas unu el la plej gravaj verkoj de la pola literaturo. Ĝi priskribas la polan socion kaj la vivon en Varsovio en la fino de la 19-a jarcento. La ĉefrolulo Wokulski, viro en siaj 40-aj jaroj, romantike enamigis al preskaŭ

neatingebla belulino el pli alta socia klaso. Lia amo esprimiĝas per bonfarado, helpado, klopodoj kaj revoj enkapaj, maksimume per kiso sur ŝian manon aŭ per rigardo al ŝi. Ne ŝi sola estas la aminda pupo, „la pupo” estas ia imago pri virino, la amata aŭ ŝatata, edziniĝenda persono, ia kunmeto el virinoj tiutempaj.

La forta amo de Wokulski al sia amatino trairas la tutan teksaĵon de la romano kiel kuniĝanta centra ŝnuro aŭ veftego, sed la amatino ne rimarkas aŭ ne aprezas ĝian valoron. Ŝi, nobelino, ne povas pripensi edziniĝon al komercisto, kiom ajn riĉa kaj bonfarema li estu. Kun tiu veftego interplektiĝas aliaj kortuŝaj homaj sortoj, parencecoj, mortoj, suferoj, plezuroj, egaj sociaj malriĉeco kaj riĉeco, edukiteco kaj maledukiteco. Interplektiĝas memoroj pri milito kaj cerbumado pri politikaĵoj, scienco, komerco kaj la socio. Multon la aŭtoro skribas pri mono, pri pruntoj, kambioj, vetoj, ŝuldoj kaj pagoj. La romanon ni povas legi ankaŭ kiel lernilon pri historio kaj interpopolaj konfliktoj, antaŭjuĝoj, precipe inter poloj, judoj, rusoj.

Pri la lingvaĵo: la vortaro bezonata por priskribi ĉion tion estas riĉega kaj enhavas terminojn pri aĵoj ne plu konataj, ekzemple pri ŝtofoj kaj vestaĵoj. Iom ĝena estas la troa uzado de



la artikolo „la” antaŭ sciigoj pri novaj aĵoj kaj aferoj, kiuj havus nedifinan artikolon mankantan al Esperanto. Iom ĝenis min ankaŭ kelkaj ig-verboj, ekzemple la grupo turni-turniĝi-turnigi. Se mi ĝuste komprenis Esperanton, *turnigi* ne estu uzata, sed ĝi aperas precipe en la diraĵo „turnigi la kapon al iu” (signifo: igi iun ŝanĝi sian opinion aŭ konduton). Tamen multe pli gravas la ĝenerala flueco, beleco kaj ĝuindeco de la traduko. Jen bona libro por lernemulo.

Raita Pyhala

Greziljono ĉi-somere

9-a – 27-a de julio: **2-a Maratona Esperanto-kurso** dum 18 tagoj (7+5+6) kun Perla Mielo, Louis Jeuland, Nina Korĵenevskaja, Mikaelo Bronŝtejn

9-a – 16-a de julio: **4-a Interŝanĝoj de scioj kaj faroj kaj Esperanto-kurso**

15-a – 21-a de julio: **Semajno de ĉiĉeronado en la regiono Anĵuo** kun Catherine Kremer

16-a – 21-a de julio: **Speciala semajno kun kursoj de Esperanto**

21-a – 27-a de julio: **30-a Internacia Esperanto-Konferenco de OSIEK**. Temo: *Esperanto en Artoj*.

11-a – 19-a de aŭgusto: **8-a Festa Semajno por infanoj kaj familioj**

Vidu la someran oferton ĉe: <http://gresillon.org/somero>
Aliĝu 2 monatojn antaŭe por ĝui redukton.



La jubilea IFEF-kongreso en Vroclavo

La jubilea 70-a kongreso de Internacia Fervojista Esperanto-Federacio (IFEF) okazis inter la 19-a kaj 25-a de majo 2018 en Vroclavo, tiu belega pola urbo kun 650.000 loĝantoj, kiu estas la sidejo de la vojevodio Malsupra Silezio, kaj ĝis la jaro 1945 ĝi estis konata sub la germana nomo Breslau. Vroclavo venkis en la konkurso *La plej bona turisma celo por la jaro 2018*, en kiu ĝi superis Londonon, Parizon kaj Barcelonon. La kongreson partoprenis 123 aliĝintoj el 20 landoj, inter kiuj estis ankaŭ kvar kroatoj. La organizantoj estis pola fervojisto kaj esperantisto **Wiesław Libner** kaj tri aliaj membroj de la LKK: **Teresa Pomorska**, **Barbara Pawlak** kaj **Ewa Tracz** kun helpo de naŭ lokaj esperantistoj el la Silezia Esperanto-Ligo (SEL). La kongreso ricevis subtenon de la urbo Vroclavo kun la urbestro **Rafal Dutkiewicz** kaj de la regiona fervojo *Koleje Dolnośląskie* kaj ĝia prezidanto **Piotr Rachwalski**.

La solena inaŭguro okazis la 20-an de majo en la vroclava universitato *Oratorium Marianum*. Post la parolado de la prezidantino de IFEF, s-ino **Rodica Todor**, la kongreson salutis la rektoro prof. d-ro hab. **Adam Jezierski**, vicprezidanto de UEA, s-ro **Stefan MacGill** kaj reprezentantoj de landaj fervojistaj Esperanto-asocioj. Nome de Kroata Fervojista Esperanto-Asocio (KFEA) salutis ĝia prezidantino **Marica Brlečić**.

Dum la kongreso okazis kelkaj piediraj urbovizitadoj, ekz. vizito al la Botanika ĝardeno kaj vespera promenado tra la malnova vroclava historia kvartalo Ostrów Tumski. Okazis kelkaj kulturaj programoj kun muziko, kiel nacia vespero kun programo konsistanta el popolaj kantoj kaj dancoj, koncerto de blinda kantisto kaj pianisto **Kaŝi – Carsten Schnathorst** kaj du koncertoj enkadre de aliaj programeroj. Unue okazis la koncerto de la ensemblo **Noproblem** el Ĉeĥio, dum la urbovizitado sur rivero Odra per ŝipo *Wratislavia*, kaj due la koncerto de profesiaj kantistoj kaj aliaj muzikistoj dum la *Ĝisrevida vespero – vroclavanoj al kongresanoj*. Krome inde

elstarigi la kantoprezentigon de la blinda gitaristo kaj kantisto **Wojciech Ławnikowicz**.

La germana ĵurnalista **Alfred Schubert** prelegis en siaj du atelieroj pri efikaj ĵurnalismo kaj farado de retpaĝoj en la komputila programo *WordPress*. Dumkongrese okazis Esperanto-kursoj por komencantoj. Tre interesa estis la faka trajnekskurso al la Fervoja muzeo en Jaworzyna Śląska, kie la vizitantoj trarigardis vapor- kaj elektro-lokomotivojn uzitajn en Pollando. Oni ekskursis ankaŭ al Świdnica, kie troviĝas granda katolika katedralo kaj ligna evangelika kirko. Al la kongresanoj sendube tre plaĉis la tuttaga ekskurso en Valo de palacoj kaj ĝardenoj, kun aparta vizito al kelkaj kasteloj kaj parkoj, ekz. al Parko de miniaturoj en Kowary, konstruita en la mezuro de 1:25. Oni anoncis la sekvont(jar)an kongreson de IFEF en Malago (Andaluzio, Hispanio), kaj ĉe la solena fermo ĝiaj organizantoj transprenis la solenan flagon kun la nomoj de sepdek ĝisnunaj urboj, kiuj gastigis la IFEF-kongresojn ekde 1948 ĝis 2018.

En la oficiala parto de la kongresa programo okazis la tiel nomata Nepublika Komitatkunsido, kies tasko estas konigi al la komitatanoj kaj iliaj anstataŭantoj kaj observantoj opiniojn kaj starpunktojn pri difinitaj problemoj kaj proponoj. Okazis ankaŭ Plenkunsido kadre de kiu estis aprobitaj decidoj kaj prezentitaj jarraportoj je la niveloj de IFEF, ĝiaj sekcioj kaj laborgrupoj, kaj rilatoj pri aliaj organizoj kaj revuoj kun kiuj la Federacio kunlaboras. Kun Internacia Komerca kaj Ekonomia Federacio (IKEF) estis subskribita kontrakto pri kunlaboro. Estis aprobitaj protokoloj kaj jarraportoj por la jaro 2017: tiu de la sekretario pri la landaj asocioj de IFEF, de gvidanto kaj sekretarioj de la sekcioj, de la Faka Komisiono, redaktoro de la oficiala organo *Internacia Fervojisto*, jarraporto de la kasisto kaj spezoekalkulo kaj bilanco por la jaro 2017 kaj propono de la buĝeto por la jaro 2019. Dum la Plenkunsido okazis reelektado kadre de la Faka Komisiono, alivorte estis konfirmitaj la ĝisnunaj

gvidanto de la Faka Komisiono **Jan Niemann**, kiu samtempe transprenis la kunordigadon de la Terminara Sekcio post demisio de ĝia ĝisnuna malsaniĝinta sekretario d-ro **Heinz Hoffmann**, kaj de la sekretario de Faka Aplika Sekcio, inĝeniero **Ladislav Kovař**. S-ro **Niemann** gvidis kunsidon de la Faka komisiono prezentinte siajn ĝisnunajn spertojn pri kunlaboro kun Internacia Fervoja Unio (UIC), kaj proponis membrojn de du laborgrupoj: grupo por faka fervoja terminologio kaj grupo por kontrolo de fakaj tekstoj kun apliko de fervoja terminologio por publikigo en Esperantaj publikaĵoj (*Fervojfakaj kajeroj* ktp.). Dum la Plenkunsido estis elektita nova ĉefkomitatano de IFEF d-ro **Zlatko Hinšt**, anstataŭante la ĝisnunan ĉefkomitatano, s-ro **Jindřich Tomišek**, kiu restos konsilanto de la prezidantaro de IFEF. Aparte okazis fakprelegoj. La ĉefa prelego de **Wiesław Libner** *Modernigo de la fervoja arkado en Gorzów Wielkopolski* rilatis al serio de arkadoj sur la fervoja linio Kostrzyn – Tczew ĉe la rivero Warta, kiu longas pli ol du kilometrojn kaj konsistas el kvin viaduktoj kaj sepdek volboj. Ĝi estas antikvaĵo el la jaro 1914 kaj la plej valora nuntempa vidindaĵo en la urbo Gorzów Wielkopolski. D-ro **Zlatko Hinšt** okazigis fakan prelegon *Kvardek jaroj de la Raĝostacio Zagreb – konstruado, graveco kaj perspektivo* kun prezentado de gravaj informoj pri ĝiaj kapacitoj kaj uziteco, transportaj efikoj kun indikiloj, kaj proponoj pri transformado de la nuna raĝostacio en logistikan-distribuan centron kaj en sekan parton de la marhaveno de Rijeka. La aliaj prelegantoj estis **Jaroslav Matuška**, **Ladislav Kovař**, **Jan Niemann**, **Florin Negrea**, **Guido Brandenburg**, **Vito Tornillo** kaj **Tianyi Wang Chielismo**.

La lastan tagon de la kongreso okazis komuna kunveno de IFEF-estraro kaj la LKK. Evidentas, ke la 70-a kongreso de IFEF estis bone organizita. Okazis ankaŭ la tritaga postkongreso en Krakovo kun tuttaga ekskurso al la fama salminejo Wieliczka.

Zlatko Hinšt

La 3-a Interkultura Majrendevuo en Vroclavo kaj Góra

La 3-a Interkultura Majrendevuo okazis inter la 19-a kaj 24-a de majo 2018 en Vroclavo kaj Góra. La ĉefa organizanto, Eŭropa Centro de Interkultura Edukado, la unuan fojon decidis iomete variigi la ĝisnunan skemon de la aranĝo, organizante ĝin en du urboj kaj komencante en Vroclavo per la 6-a Eŭropa Festivalo de Esperantaj Kantoj, kiun gvidis **Malgosia Komarnicka** kaj **JoMo**. Sekve, la partoprenantoj de la Majrendevuo estis veturigitaj al Góra, kie oni daŭrigis la riĉan programon, preparitan kune kun la loka Universitato de la Tria Aĝo kaj la Esperanto-Klubo en Góra.

La organizantoj atingis pli ol la starigitajn celojn, respektive vigligis la kunlaboron kun neesperantistaj medioj kaj disvastigis Esperanton. Tio kaŭzis, ke la partoprenantoj fariĝis bonegaj

ambasadoroj de Esperanto. Baldaŭ fondiĝos nova Esperanto-klubo kaj komenciĝos kurso.

La 3-a Interkultura Majrendevuo konsistis ne nur el la kantfestivalo, sed ankaŭ el AMO-seminario, kiu gvidis **Stefan MacGill**, la 4-a Internacia Simpozio, kiun gvidis **Malgosia Komarnicka** kaj **Regina Kumala**, laborsesioj, ekskursoj, artaj programoj. Kaj esperantistoj kaj neesperantistoj havis la eblecon admiru la bildo-ekspozicion de la vroclava artistino **Elżbieta Wodała**, manĝi hejme faritajn manĝaĵojn kaj vespere amuziĝi kantante kaj dancante kun JoMo kaj bulgaraj kantistoj.

La aranĝo finiĝis per Interkultura Koncerto kun partopreno de la urbestriko de Góra kaj lokaj eminentuloj, dum kiu la publiko komune dancis.

Malgosia Komarnicka



Ĉarmujo

Ĉu vi iam sonĝis, ke vi estas en la plej ĉarma lando, inter la plej amikemaj personoj? Tion mi sonĝas preskaŭ ĉiunokte, sed en majo mi vere trafis tian lokon: la 3-an Interkulturan Majrendevuon!

Oni ofte demandas min: Ĉu plaĉis al vi tiu aranĝo? Ĉu plaĉis Pollando? Mi ĉiam respondas: Mi trovas nenion, kio povus malgrandigi la ekstreman ĉarmon de ili. La aranĝo estis perfekte organizita.

Mi (la sola en Ukrainio) instruas Esperanton al grupo da pensiuloj. Mi preferas zorgi ĝuste pri tiuj personoj, kiuj en mia lando estas nesufiĉe estimataj kaj lastatempe ege malriĉaj. Pro tio por mi estis aparte kortuŝita povante partopreni la 3-an Interkulturan Majrendevuon, ĉar ĝia organizantino, samideanino **Malgosia Komarnicka**, aktivigis tie, krom diversaĝulojn, ankaŭ multe da esperantistoj-pensiuloj el diversaj lokoj de Pollando. Ŝi invitis min por renkontiĝi kun ŝiaj lernantinoj-pensiulinoj. Mi estis ĉarmita de la junaj maljunulinoj.

Al mi plaĉis, ke en Vroclavo mi (kaj ĉiuj aliaj) estis frumatene salutita en la stacidomo, amike manpremita kaj dum la tuta aranĝo mi sentis la

helpemon de la gastigantoj. Same tiel ankaŭ mi faras invitante gastojn por miaj Esperanto-aranĝoj.

La programo estis mirinda: gravaj kaj seriozaj sperto-interŝanĝaj prelegoj kaj konversacioj pri Esperanto (AMO-seminario de Stefan MacGill, prezento de la tre interesa kaj vere alloga kaj zorgeme kreita nova pola Esperanto-lernolibro de Edward Malewicz, la 4-a Internacia Simpozio pri belkolorigo de ĉiutageco, la 6-a Eŭropa Festivalo de Esperantaj Kantoj, gajoplenaj kantadoj kaj dancadoj ĉe lignofajro, turismaj vizitoj al la plej interesaj vidindaĵoj de la regiono, partopreno en lecionoj pri unikaj manfaradoj, amikaj konversacioj). Ni estis unueca amika familio! Dankon al JoMo kaj la bulgaraj kantemuloj, kiuj grave helpadis per siaj kantoj, ke ni sentu nin gefratoj.

La rezulto: ne nur esperantistoj ricevis maksimuman utilon, sed ankaŭ multaj neesperantistoj, kiuj vizitis la aranĝon. Ĉio estis farita ne por feliĉigi nur nin, sed ankaŭ la aliajn homojn.

Grandan dankon pro la ne ensonĝa, sed reala Ĉarmujo.

Svetlana Pogorelaja

La verkoj de Ivo Andrić tradukitaj Esperanten

En ĉi tiu artikolo troviĝas faktoj pri Esperantaj tradukoj de la verkoj de **Ivo Andrić** (1892-1975). La teksto pritaksas la periodon inter la jaroj 1920 kaj 2015. Ĝi indikas la bazajn informojn pri la Esperantaj gazetoj kaj revuoj, sed ankaŭ pri tradukantoj, kun mallonga pritaksto de la problemoj de tradukado el la verkoj de Andrić.

„En milo de diversaj lingvoj, en la plej diversaj vivkondiĉoj, de jarcento al jarcento... oni ŝpinas la historion de la homa sorto, kiun senfine kaj senĉese rakontas homoj al homoj... kaj la rakontado estas senfina.”

Tiamaniere Ivo Andrić, en sia parolado dum la Nobelpremia ceremonio, priskribis la rakontadon kaj verkadon kiel eternan bezonon por kompreni la vivojn propran kaj ĝeneralan. El tia bezono naskiĝis ankaŭ la Internacia Lingvo Esperanto.

Ekzistis multaj malsukcesaj projektoj de helplingvo, sed la unika Esperanto „travivis” proksimume 130 jarojn. Ĉi tiun lingvon iniciatis kaj ĝian bazon projektis la juda kuracisto **Lazaro Ludoviko Zamenhof** (1859-1917). Li loĝis en la nuntempa pola urbeto Bjalistoko, en la strato kie loĝis poloj, rusoj, litovoj, germanoj, judoj... Estante gimnaziano, li konkludis, ke la kvereloj inter tiuj homoj plej ofte okazas pro miskomprenoj. Sciante, ke ili ne povus ellerni ĉiujn lingvojn de siaj najbaroj (li persone jam tiam parolis kvin aŭ ses lingvojn!), li decidis krei facilan, simplan kaj tutkompletan lingvon, kiun oni povus lerni rapide kaj sen granda peno, kaj per kiu oni povus plifaciligi sian interkompreniĝon kaj maloftigi aŭ forigi la najbarajn kverelojn kaj miskomprenojn.

Tiun sian junaĝan ideon li efektivigis kiel oftalmologo en Varsovio. Li aperigis *La Unuan Libron*, kiu estis la unua lernolibro de la nova lingvo, subskribinte ĝin per la pseŭdonimo **d-ro Esperanto**. La libro aperis la 26-an de julio 1887. Pro sia simpleco

kaj reguleco, la nova lingvo rapide allogis multnombrajn adeptojn, kaj la pseŭdonimo de ĝia aŭtoro, donis al ĝi la nomon, kiun ni nuntempe uzas.


La aŭtoro revis, ke „lian” lingvon lernos homoj en la tuta mondo. Lia revo ankoraŭ vivas inter liaj adeptoj, kaj optimistoj opinias, ke en la mondo vivas ĉirkaŭ dek milionoj da esperantistoj. Multaj el ili efektive konas nur la bazon de tiu lingvo, sed tamen ili vojaĝas tra la mondo. Esperantistaj organizaĵoj funkcias en 140 landoj sur ĉiuj kontinentoj, kaj la lingvo havas sian originalan kaj tradukan literaturon, ĝi estas instruata en lernejoj kaj fakultatoj, havas sian gramatikon, vortarojn, sciencajn librojn, turismajn gvidlibrojn ktp. Tamen, malantaŭ ĝi staras nek iu popolo, nek ŝtato. Ĝi apartenas al ĉiuj, kaj ĝia baza celo estas pli facila komunikado inter homoj.

La fonto de Esperanto estas radikoj kaj gramatikaj principoj de naciaj lingvoj. Plimulto el la vortoj, kiuj estas internaciaj, fariĝis konsistiga parto de Esperanto. En tiu lingvo ekzistas tradukoj de elstaraj verkoj de la monda literaturo, inter kiuj



troviĝas ankaŭ famaj verkoj el la serba beletra, inkluzive de pluraj prozaĵoj de Ivo Andrić.

La ĉefa motivo por ĉi tiu teksto estas la traduko de la romano de Ivo Andrić *La ponto super Drino*, kiun antaŭ pli ol kvindek jaroj faris la serba esperantisto **Antonije Sekelj**, tiutempe ricevinte konsenton kaj kuraĝigon de la aŭtoro mem. Poste komenciĝis sociaj skuoj, kaj la senkompata tempopaso forigis la memoron pri la aŭtoro kaj tradukinto. Ne plu ekzistas eĉ la lando en kiu la traduko devis aperi. Eĉ pli: ne ekzistas la lingvo



Ivo Andrić antaŭ la ponto en Višegrad (Bosnio), kiu „ĉefrolas” en lia romano *La ponto super Drino*.

(serbokroata), en kiu onidire la romano estis verkita! Pri la malfeliĉo trafinta la tradukon, siatempe artikolis Žarko Rajković sub la titolo *Oni ne havas monon por Andrić – La odiseo de unu traduko* (en revuo *Svijet*, n-ro 10492 de la 3-a de septembro 1980).

Ĉirkaŭ kvindek jarojn poste, la filino de la tradukinto, sciante kiom forte ŝia patro deziris aperigi tiun ĉi tradukon (sed ne sukcesis fari tion dum sia vivo), decidis plenumi lian deziron kaj publikigi tiun romanon okaze de lia 30-jara morto-datreveno. Sed tiu tasko estas ligita kun multe da laboro. La traduko, farita antaŭ pli ol duonjarcento, devis esti denove atente relegata, kaj tion devus fari esperantisto, kiu devenas ekster la slava lingva regiono, kaj kiu samtempe konas la lingvon de la originalo. Tiamaniere la tradukon oni liberigis de tiel nomataj *serbismoj* aŭ *slavismoj*, kiuj ekestis preter la deziroj kaj intencoj de la tradukinto, sub la influo de la strukturo de lia gepatra lingvo. Ili farus la tradukon malfacile komprenebla por homoj el aliaj lingvaj grupoj. La libro aperos verŝajne dum ĉi tiu jaro, post multaj klopodoj de pluraj homoj. Tiamaniere, dank' al la grava momento por la traduka Esperanto-literaturo, estas preparita ĉi tiu teksto, kiu kompletigas la liston de la Esperantigitaj verkoj de Ivo Andrić.

Grava problemo alfrontata dum la tradukado de la verkoj de Ivo Andrić estas granda nombro da turkismoj en la cetera serba teksto. Konsiderante Bosnion kiel la okazejon de la romano *La ponto super Drino*, la multeco da turkismoj estas tute normala karakterizo de tiu verko. La turkdevenaj vortoj en la serba lingvo travivis parolajn ŝanĝojn, ĉar iuj sonoj el la turka ne ekzistas en la serba lingvo. Pluraj el tiuj vortoj ŝanĝis ankaŭ sian signifon, kaj aliaj tute malaperis el la turka lingvo, sed en la serba lingvo ili daŭre uzatas. Tiujn kaj tiajn vortojn oni trovas en la serba kaj en aliaj lingvoj, kies popoloj longtempe estis sub la okupacio de la Otomana Imperio. La serbaj vortoj: *kapija*, *avlija*, *kasaba*,

pendžer, *ĉaršija*, *kadija*, *rakija*, *sokak*, *paša*, *merak*, *janjiĉar*, *kijamet* kaj similaj, travivis nur voĉajn ŝanĝojn, kaj nuntempe ekzistas en ambaŭ lingvoj. La vortoj *duvan*, *darmar*, *šegrt* aŭ *gungula* restis nur en la serba kaj tute malaperis en la turka lingvo. Krom ili ekzistas aliaj vortoj, el kiuj kelkaj malnoviĝis, aliaj ŝanĝis la antaŭan signifon, kaj iuj nuntempe estas uzataj, kvankam ne ĉiam en la signifo, menciita en la romano *La ponto super Drino*: *asker*, *avdest*, *vakuf*, *gazija*, *dekika*, *dunjaluk*, *esnaflija*, *jarabi*, *jaramaz*, *kaurin*, *mahala*, *meraklija*, *nimet*, *seiriti*, *sevap*, *ĉejf*, *hain*, *haram*, *hairli*, *džamlj*, *šuĉur* kaj similaj. Tio starigas apartan taskon antaŭ la Esperantaj lingvistoj, kiuj tiajn vortojn notas en vortaroj, sed tamen kun asterisko (*), en la libro aldone klarigante ilin en la glosaro aŭ piednotoj. Tiuj vortoj preskaŭ ĝenerale perdis sian signifon en la nuntempa lingvaĵo, kaj modernigo de ilia iama signifo estus tute sensenca kaj ŝanĝus la atmosferon de la verko, kiu prezentas okazaĵojn kaj homojn de antaŭ kelkaj jarcentoj. Pro tio la tradukado de la romano *La ponto super Drino* prezentas ankaŭ leksikologian provokon por esperantistoj.

Tradukoj al Esperanto estas gravaj ankoraŭ pro unu speciala kialo. Tiu lingvo estas rapide lernebla, regula kaj sen gramtikaj esceptoj, kio ebligas ke ĝi servu kiel ponto-lingvo. Estas tasko de esperantistoj, speciale devenantaj el malgrandaj popoloj, traduki gravajn verkojn de siaj literaturoj al Esperanto, per kio ili ebligas retradukadon de tiuj verkoj al aliaj lingvoj de same malgrandaj popoloj. Pro sia reguleco kaj multnombraj internaciaj esprimoj, tradukoj pere de Esperanto kiel ponto-lingvo, verŝajne estas plej proksimaj al la originalo.

La motivoj por traduki la verkojn de Ivo Andrić al Esperanto estas diversaj. Foje temas pri individua prefero de la tradukanto aŭ lia deziro konigi al la mondo la plej bonajn verkistojn de nia literaturo, aliffoje decide efikis la Nobelpremio, kiun Andrić ricevis, aŭ diversaj datrevenoj de la verkisto, iu lia verko aŭ ricevita premio. Pro la specifeco de la esprim-maniero de Andrić,

malmultaj kuraĝis traduki liajn pli ampleksajn kaj pli konatajn verkojn. La traduko de Antonije Sekelj apartenas al tiuj esceptaj kaj ampleksaj verkoj, inter kiuj *La ponto super Drino* efektive estas la ĉefverko de Ivo Andrić, por kiu li ricevis la literaturan Nobelpremion en 1961.

Estas interese, ke la tradukantoj, laŭ la propraj asertoj, tradukadis la verkojn de Ivo Andrić el tri lingvoj: el la serba, serbokroata kaj kroata. La tradukantoj estas homoj, kiuj Esperanton lernis pro diversaj kialoj, kaj ili mem apartenas al tre malsamaj profesioj. Tio supozigas ankaŭ la malsaman kvaliton de la faritaj tradukoj.

Laŭ nia konstato, la informoj pri Esperantaj tradukoj, troviĝantaj en la oficiala *Bibliografio de Ivo Andrić* (2011), ne estas kompletaj, ĉar en ĝi mankas pluraj tradukoj aperitaj en periodaĵoj. Ni publikigas la kronologian trarigardon de la tradukoj el la verkoj de Ivo Andrić en Esperanto, sed antaŭ la menciitaj verkoj, ni aldonas la respektivajn numerojn el la *Bibliografio*.

BIBLIOGRAFIO (libroj)

(1013) *Sonĝo kaj maldormo sub la karpeneto* (San i java pod grabrićem). Enhavo: *Sonĝo kaj maldormo sub la karpeneto* (San i java pod grabrićem), paĝoj 3-6; *Rakonto pri la salo* (Priĉa o soli), paĝoj 7-11; *Falĉilo* (Kosa), paĝoj 12-16; *Interparolo* (Razgovor), paĝoj 17-21, *Ĉasado de tetro* (Lov na tetreba), paĝoj 22-27; *Dumvintre* (Zimi), paĝoj 28-31; *La festo* (Sveĉanost), paĝoj 32-40; *Ekskurso* (Izlet), paĝoj 41-47; *En kverelo kun la mondo* (U zavadi sa svetom), paĝoj 48-52; *Sur la suna flanko* (Na sunĉanoj strani), paĝoj 53-57; *La suno* (Sunce), paĝoj 58-62; *Sur la ŝtata bieno* (Na državnom imanju), paĝoj 63-71, Gorĝe Gorĝević (Đorđe Đorđević), paĝoj 72-78. Internacia Kultura Servo, 1972, tradukis Roger Imbert kaj Zlatko Tišljar.

(1014) *Vizaĝoj* (Lica). Enhavo: *Vizaĝoj* (Lica), paĝoj 3-8; *Byron en Sintra* (Bajron u Sintri),

paĝoj 9-14; *Detruoj* (Razaranja), paĝoj 15-20; *Vortoj* (Reĉi), paĝoj 21-29; *Sur la stadiono* (Na stadionu), paĝoj 31-36; *Striko en la teksejo de tapiŝoj* (Ŝtrajk u tkaonici ĉilima), paĝoj 37-44; *Somerumado en la sudo* (Letovanje na jugu), paĝoj 45-56; *Pontoj* (Mostovi), paĝoj 57-59). Esperanto-Ligo de Bosnio kaj Hercegovino, 1981, tradukis Ladislav Režek.

(1015) **Soifo** (Žeđ). Enhavo: *La ponto trans Ĵepa* (Most na Žepi), paĝoj 5-14; *Soifo* (Žeđ), paĝoj 15-26 (tradukis Lucija Borčić); *La montoj ĉe Rzav* (Rzavski bregovi), paĝoj 27-40; *En akvomuelejo* (U vodenici), paĝoj 41-47; *Morto en la tekio de Sinan* (Smrt u Sinanovoj tekiji), paĝoj 49-61). Esperanto-Ligo de Bosnio kaj Hercegovino, 1988, tradukis Ladislav Režek (la tradukon prilaboris Lucija Borčić).

Novelo **Mustafa Maĝar**, en: *Moderna bosnia-hercegovina novelo* (antologio). Esperanto-Ligo de Bosnio kaj Hercegovino, 1989, paĝoj 33-42, tradukis Ladislav Režek.

BIBLIOGRAFIO (periodaĵoj)

(4124) **La infanoj** (Djeca), el la ciklo *Maltrankviloj* (Nemiri), en: *Literatura Mondo*, n-ro 12/1924, paĝoj 185-186, tradukis Fran Janjić.

(4125) **Pri la venkoj** (Iznad pobjeda), el la ciklo *Maltrankviloj* (Nemiri), en: *Literatura Mondo*, n-ro 12/1924, paĝo 185, tradukis Fran Janjić.

(4126) **Rakonto el Japanio** (Priĉa iz Japana), el la ciklo *Maltrankviloj* (Nemiri), en: *Literatura Mondo*, n-ro 12/1924, paĝo 186, tradukis Fran Janjić.

(4127) **Ex Ponto**, (fragmentoj), en: *Balkana Konkordo*, n-ro 4/1931, paĝoj 6-7, tradukis J. d'Agreŭe (Ivo Rotkvić).

(4128) El la **Ex Ponto** (fragmento), en: *Literatura Mondo*, n-ro 5/1932, paĝo 85, tradukis Jean d'Agreŭe (Ivo Rotkvić).

(4129) **La ponto sur Ĵepa**, en: *La Suda Stelo*, n-ro 3 (98)/1948, paĝoj 4-5 kaj n-ro 4(99)/1948, paĝoj 4-5, tradukis Božidar Vancik.

(4130) **Olujacianoj** (Olujaci), en: *Nia Vivo* n-ro 3/1955, paĝoj 21-41; presita brajle.

(4131) **Ex Ponto** (fragmento), en: *La Suda Stelo*, n-ro 1(145)/1956, paĝo 8, tradukis Josip Velebit.

(4132) **La palisumo** (fragmento el *La ponto super Drino*), en: *La Suda Stelo*, n-ro 4 (148)/1956, paĝoj 66-68, tradukis Drago Kralj.

(4133) **Vintre** (Zimi), en: *La Progreso* (Beogrado), n-ro 26/1956, paĝoj 2-3, tradukis Živko Ivanović.

(4134) **Ex Ponto** (fragmento), en: *La Progreso* (Beograd), n-ro 3(37)/1957, paĝo 2, tradukis Petar Stefanović.

Fragmentoj el **Ex Ponto**, en: *La Nica literatura revuo*,

n-ro 4(10)/1957, paĝoj 153-155, tradukis Josip Velebit.

(4135) **Ponto super (la) Drino** (fragmento), en: *Heroldo de Esperanto*, n-ro 17(1347)/1962, paĝoj 3-4, tradukis Antonije Sekelj.

Ekstradicio de Rigas Fereos, en: *Beograda Verda Stelo* (Beograd), n-ro 2/2007, paĝoj 36-39, tradukis Miodrag Stojanović.

Infanoj, en: *Beograda Verda Stelo* (Beograd), n-ro 6/2008, paĝoj 5-16, tradukis Agnesa Eremija.

Letero de jaro 1920, en: *Beograda Verda Stelo* (Beograd), n-ro 10/2009, paĝoj 24-44, tradukis Agnesa Eremija.

La ponto super Drino (fragmento), en: *Literatura foiro* n-ro 274/2015, paĝoj 65-67, tradukis Antonije Sekelj.

Dimitrije Diso Janičić

Pri la traduko kaj la tradukinto

Renkonte al la publikigo de la Esperanta traduko de *La ponto super Drina*, la Nobelpremiita verko de la serba verkisto Ivo Andrić

La romanon *La ponto super Drino* de la serba verkisto **Ivo Andrić** tradukis **Antonije Sekelj** (Hódmezővásárhely, 1907 – Beogrado, 1986), la pli aĝa frato de la konata Esperanta esploristo Tibor Sekelj. Esperanton li ellernis en 1952 kaj dum jaroj li fariĝis unu el la plej gravaj serbaj aktivuloj.

Aparte aprezata estas lia traduka laboro, kaj lia plej granda kaj plej valora traduko estas ĝuste *La ponto super Drino*. La romanon planis publikigi konata sarajeva eldonejo, kiu ricevis la manuskripton, sed pro la disfalo de Jugoslavio tio ne okazis. Dum la militaj jaroj la manuskripto ĉe tiu eldonejo perdiĝis, kaj Ljiljana Sekelj Milenković, la filino de Antonije, tri jardekojn poste retrovis kopion de la traduko, kiun per ŝia financa helpo publikigos Dokumenta Esperanto-Centro el Đurđevac. La verko aperos en la fama *Serio Oriento-Okcidento* de UEA, sub la numero 55.



Antonije Sekelj

Ankoraŭ en 1963 la tradukon tralegis la Akademiano Ivo Rotkvić el Zagrebo, kiu en sia letero de la 18-a de aprilo 1963 skribis al la tradukinto: *Pri via tradukmaniero mi povas diri nur laŭdajn vortojn kaj mi*

sincere vin gratulas pro la tre valora riĉigo de nia traduka esprimmaniero. Tiu juĝo por vi persone havas pli da agnosko ol kutime, ĉar mi mem aplikas diferencon tradukmanieron. Sed volante esti objektiva, mi devas depreni la ĉapelon antaŭ vi, ĉar vi konsicence kaj faksperte plenumis vian taskon. Aparta ĉarmo de via traduko por mi estis via plena submetiĝo al la aŭtora nacilingva frazo. Tial multloke elvolviĝis vortordo ne ĉiutaga en Esperanto, sed tamen frapa kaj emfaza. Tia maniero surŝutas sur la verkostilon ian patinon, kiu por

frandemuloj estos apartaj ĝuo kaj stiltraĵo de la aŭtoro. Neeviteble estos kelkaj, kiuj trasorbitaj de la Esperantaj kliŝstilaĵoj, riproĉetos. Sendube, la stilo de la aŭtoro estas travideble klara, eposece distrena prirakontado. Sed ĝuste en tiu klaro kaj senemocia temdisvolvo estas la Andriĉa rafiniteco. Kompreneble, se oni volus trafrizi la tradukon per elrafino, ĝi perdus sian spontaneecon, kaj mi mem ne estas konvinkita, ke per tio oni multon gajnos. Male, mi estas certa, ke via tradukmaniero trovos varman akcepton ĉe la esperantistaro ĝenerale. Kaj fine,

estas ne mirige, ke estas multaj viafaraj lingvaj solvoj, kiujn mi formulus alimaniere, sed tio estas nur personaj preferoj, ili tute ne estas verukoj en via tradukaĵo. Resume, mi estas feliĉa, ke denove el nia lando elflugos verko gravega en la Esperanta vesto, kiu servos al la honoro de la movado. Kaj tiurilate viaj meritoj estas pli ol grandaj.

La definitivan kompostajon de la roman provlegis **Rob Moerbeek**, kiu karakterizis ĝin literatura juvelo. La antaŭparolon por tiu ĉi eldono verkis **Mark Fettes**, la prezidanto de UEA.

Esperanto forigas lingvajn barojn



Mi estas studentino de la Esperanto-kurso, kiun gvidas Małgosia Komarnicka en Vroclavo. Instruante nin ŝi rakontas al ni ankaŭ pri la Esperanto-movado, kaj de tempo al tempo ŝi invitas esperantistojn-eksterlandanojn por ke dum la kurso ni provu paroli kun ili. Ŝi preparis ankaŭ ekskurson al Budapeŝto, por ke ni konvinkiĝu, ke valoras koni Esperanton.

Post duhora malfruiĝo, la okpersona grupo alvenis al la ĉefurbo de Hungario. Atendis nin, malgraŭ la malfruiĝo, du ĉarmaj esperantistinoj, **Éva Baloghné Fodor** kaj **Anna Besenyei**. La saman tagon ni jam komencis viziti la urbon per ŝipo, admirante la bele lumigitajn konstruaĵojn ambaŭflanke de la rivero Danubo. Tiu ŝipvojaĝo alportis al ni neforgeseblajn impresojn. Ni estis ravitaj per belaj vidaĵoj.

La sekvan tagon matene, kun Anna ni vizitis historiajn restaĵojn de Buda, kaj posttagmeze kun Eva ni jam dancis kaj trinkis teon ĉe esperantistoj en Peŝto. Budapeŝto estas la unuiĝo de tri urboj, Pest, Buda kaj Óbuda.

Eva instruas ne nur Esperanton, sed ankaŭ dancadon, kaj dank' al tio ni povis ekkoni kaj ellerni specialajn dancojn por pliaĝuloj. Kun granda plezuro ni admiris la bele dancantajn hungarajn pliaĝulojn, kaj fine de tiu „danca renkontiĝo” reprezentantinoj

de la vroclava dancgrupo *Gracje* prezentis sian dancaranĝon je la muzikfuroro *Despasito* elvokante aplaŭdon.

En la Esperanto-Klubo atendis nin lokaj esperantistoj kaj ni povis konvinkiĝi kiel utila estas la lingvokono de Esperanto. Kompreneble, komence ni timis paroli, sed iom post iom ni ekprogresis... Dank' al Esperanto ni sentis nin kiel en bona familio.

La sekvan tagon ni vizitis kelkajn gravajn objektojn de Peŝto, admirante la historian scion de nia ĉiĉeronino Anna.

Dum nia mallonga tritaga restado en Budapeŝto ni havis ankaŭ la eblecon gustumi la bongustajn hungarajn manĝaĵojn...

Ni revenis Pollandon feliĉaj, tenante en niaj koroj la belegajn momentojn, kiujn ni pasigis en Budapeŝto dank' al Małgosia, Éva kaj Anna.

La unua el ili, kun la eksterlanda ekskurso, donis al ni la kuraĝon kaj deziron viziti aliajn lokojn pere de Esperanto. Julie ni probable vizitos la germanan urbeton Herzberg am Harz – kiu ahvas la epiteton de la Esperanto-urbo – al kiu invitis nin reprezentantoj de Interkultura Centro Herzberg Zsófia Kóródy kaj Petro Zilvar.

Lucyna Kowalewska



Kunagade.org

Se vi ricevis ĉi tiun mesaĝon, tio signifas ke vi estas parto de speciala grupo de homoj kiuj parolas Esperanton kaj agadas favore al ĝi, kaj kiuj certe havas almenaŭ unu el la jenaj aliroj por tion fari: (1) ŝaton, (2) intereson kaj/aŭ (3) etikan aŭ ideologian kialon.

Pro tio, antaŭ ol prezenti la kialon de ĉi tiu retmesaĝo, ni volas danki vin pro via penado kaj strebo por ĉi tiu komuna projekto kaj realaĵo nomata Esperanto.

PREZENTO. Mi estas Juan Diego Díaz Bautista, homo kiu loĝas en Sevilla (Andaluzio, Hispanio) kaj kiu nuntempe respondecas pri la verkado de Raporto 'Esperanto kaj Universitato' por ESF (esperantic.org), kiu estos prezentata dum Nitobe-Simpozio, tiuj post la Universala Kongreso en Lisbono 2018.

PRI LA RAPORTO. Nia aliro por esplori la nunan situacion de la rilato Esperanto kaj Universitato estas samtempe larĝasenca kaj konkreta per tri flankoj: (1) priskribi la nunan situacion de Universitato kaj de Universitato-kaj-Esperanto, (2) kolekti kaj registri informojn, kaj (3) proponi kaj sugesti paŝojn por agadi estontece. Nia celo estas kumpensi kiel disvastigi Esperanton kaj enkonduki ĝin en la Universitato. Kaj pro tio ni kontaktas vin.

KUNAGADO. Ĉi tiu retmesaĝo estas sendata al homoj el ĉiuj partoj de la mondo. Tiel, ni povas diri ke nia propono por vi por helpi kumpensi la rilaton Universitato kaj Esperanto estas monda kumpensado. Ĉu vi partoprenus en nia esploro? Oni ne bezonas ke vi estu universitatano aŭ laboristo de Universitato. Ĉiuj homoj povas kontribui. Se vi jesas al tiu respondo, ni dankus se vi:

(1) plenumas la jenan demandaron: https://docs.google.com/forms/d/e/1FAIpQLSfqrjA3pBIv8Bp-B742_XP_vMaDHDvtjoKSaM467-EbaCu7NQ/viewform?usp=sf_link

(2) dissendas ĉi tiun retmesaĝon inter viaj konatuloj kaj

3) helpas nin plenumi diversajn datumlistojn:

<http://kunagade.org/datumlistoj/>

PLIA INFORMO: kunagade.org

NOTO: Ni sendis ĉi tiun retmesaĝon per du retadreso: raporto@kunagade.org kaj kunagade@gmail.com. Bonvole kontrolu ĉu via retroŝto taksis ĝin kiel trudmesaĝo/spamo.

Antaŭdankon,

Kunagade RAPORTO

Retejo: kunagade.org

Verkistoj en Hraščina

La 15-a Renkontiĝo de verkistoj okazos la 15-an de septembro en la Bieno Njeguŝ en Hraščina. La ĉefa gasto estos Mikaelo Bronŝtejn. Koncertos je perkutinstrumentoj Kaja Farszky kaj Nenad Sinkauz, per subvencio de Ministerio pri kulturo.

Mikaelo Bronŝtejn koncertos krome por la publiko de Hraščina aldone la 17-an de septembro. La komunumo Hraščina pagos lian flugbileton.



Jarkunveno de KEL



La 12-an de majo en Zagrebo okazis la elekta jarkunveno de Kroata Esperanto-Ligo, dum kiu estis elektita la nova estraro. Kiel prezidanto de la Ligo estis elektita Spomenka Ŝtimec, vicprezidantoj fariĝis Boris Di Costanzo (Rijeka), Judita Rey Hudeček (Zagrebo) kaj Davor Klobučar (Osijek). Novaj membroj de la Estraro estas: Grozdana Grubišić-Popović (Bjelovar), Ankica Jagnjić, Robert Milijaš, Anto Mlinar kaj Siniša Dvornik (Zagreb) Por la membroj de la Kontrola komitato elektigis: Đivo Pulitika, Ljerka Stilinović kaj Mila Bečka.

La jarkunvenon nome de Bjelovara esperantista societo partoprenis kvar delegitoj: Grozdana Grubišić-Popović, Zdenka Polašek, Nenad Margetić kaj Franjo Forjan.

Nome de DEB, Zdenka Polašek konigis al la asembleanoj la manifestacion *Alp-Adria Esperanto-Konferenco*, kiu okazos en Bjelovar inter la 8-a kaj 10-a de junio, kaj Franjo Forjan invitis la delegitojn partopreni ankaŭ la sesas renkontiĝon *Esperantistoj de Bjelovar al sia urbo*, okazontan la 23-an de septembro 2018, enkadre de la festado de Tago de la urbo. Li ankaŭ menciis, ke okaze de sia 110-a datreveno DEB planas eldoni monografion, kiu dokumentos la longan tradicion de Esperanto en Bjelovar.

Franjo Forjan

La ĝusta decido!

Multaj privataj Esperanto-kolektoj estas parto de la komuna heredaĵo de nia movado, sed ili malofte havas feliĉan finon! Kutime ili malaperas kiel nebezona rubo, ĉar la posedantoj ne scias al kiu lasi ilin, kaj iliaj posteuloj ne konas la valoron, kiun tiaj kolektoj havas nur por ni, esperantistoj. Tial min tre agrable surprizis unu tute alia ekzemplo! Nia estimata Esperanto-verkistino Zora Heide proponis, ke ŝian kolekton transprenu la nacia Dokumenta Esperanto-Centro (DEC) en Ĵurdevac. Neofte okazas, ke esperantistoj faras tian decidon ankoraŭ dum sia vivo, des malpli ofte okazas, ke tion faras personoj fizike sanaj, kiel s-ano Zora.

Laŭ nia antaŭa interkonsento, mi venis al ŝia domo en la zagreba kvartalo Borongaj, kie atendis min vere nekutima sceno: plena ĉambro da libroj! Sed pli ol la sceno impresis min la stato de la kolekto kaj ĝia kompleto. Kutime DEC ricevas intermiksitan materialon, ofte humidan aŭ polvan, sed la kolekto de s-ino

Zora Heide orde staris sur la bretoj kaj en ŝrankoj. Foresto de polvo atestas, ke temas pri persono, kiu ne nur kolektas, sed ankaŭ legas. Kaj s-ino Zora legas en pluraj lingvoj: kroata, Esperanta, sveda, dana, islanda ...

Kompilante la liston de la transprenita materialo, mi devis konstati, ke temas pri unu el la plej valoraj ĝisnunaj kontribuoj al DEC, pri vere rafinite elektitaj titoloj, zorge konservitaj kaj nedifektitaj. Tio per si mem diras multon ankaŭ pri la posedantino kaj ŝia ŝato al literaturo! Des pli mirigas ŝia decido disiĝi de la kolekto, zorge organizata dum multaj jaroj kaj en pluraj landoj.

Mia vizito okazis dimanĉe, la 6-an de majo, kaj mi bezonis dekon da tagoj por kompletigi la liston de la transprenitaj Esperantaĵoj. Montriĝis, ke la tuto konsistas el proksimume 380 Esperantaj libroj, 130 kroataj kaj serbaj, 170 svedaj, 32 anglaj, 3 francaj, 42 islandaj, 12 danaj, 4 nederlandaj, 4 rusaj kaj 3 alilingvaj libroj, 850 ekzempleroj de diversaj



Esperantaj gazetoj, 136 turismaj prospektoj, 127 propraj libroj de Zora Heide en la sveda, kroata kaj Esperanto kaj 70 diversaj (fotoj, leteroj ktp.).

Certe temas pri imitinda ekzemplo, kiun sekvu ankaŭ aliaj kroataj esperantistoj.

Koran dankon al nia estimata samideano Zora Heide pro la mirinde valora kontribuo al DEC!

Josip Pleadin

Vizito al Etelka Jakupović

Antaŭ kelkaj jaroj mi havis telefonvokon el Zemun (Serbio). Aliflanke de la telefonlinio parolis Etelka, la vidvino de la konata serba esperantisto Adem Jakupović. Etelka, kiu mem estas fervorega esperantistino, vokis min, ĉar ŝi aŭdis pri Dokumenta Esperanto-Centro kaj ĝiaj klopodoj kolekti la materialon pri Esperanto. Ŝi volis diri al mi, ke en ŝia loĝejo troviĝas la arkivo de la Zemuna Esperanto-Societo *Branko Rajšić*. Dum tiu interparolo mi eksciis, ke ŝi ne volus transdoni la materialon en la posedon de DEC, sed ŝi volonte permesus ĝian kopiadon kaj skanadon.

Post tiu interparolo fulme pasis kelkaj jaroj, kaj apenaŭ la 19-an de majo ĉi jare, mi havis la eblecon viziti Serbion kaj Etelkan. Akompanita de Zlatoje Martinov, la redaktoro de *Literatura Foiro*, kiu vivas tre proksime, mi vizitis la



loĝejon de Etelka, sed ni trovis ŝin tre malsana, kaj nur helpe de ŝia juna parenco Jožef ni sukcesis fari iom pli proksiman kontakton.

Ligita al malsanula lito, Etelka estas malofte vizitata de aliuloj, des malpli ofte de

esperantistoj, kaj nia vizito tre videble kortuŝis ŝin.


Dum la tuta vivo ŝi estis tre aktiva esperantistino kaj kune kun sia edzo Adem ŝi gvidis la lokan societon. Sed nun jam ne plu ekzistas junaj membroj, kaj la zemuna societo ankoraŭ nur formale ekzistas.

Pri la arkivo de la zemuna societo ni sukcesis fari nenion dum nia vizito. Oni translokis ĝin en la kelon, kaj ni devos pacience atendi ĝis (kaj se) oni retrovos ĝin. Ni esperu, ke ne estos malfrue por savi tiun valoregan materialon pri la societo, kiu funkcias ekde 1913.

Sed la vizito al Etelka restos al mi longe en la memoro. Kvankam ŝi estas preskaŭ blinda, ŝiaj memoroj pri homoj kaj eventoj revenigis nin en la gloran tempon de la zemuna Esperanto-societo.

Josip Pleadin

Lepoglava: punktoj kaj malliberejo



Se oni mencias la nomon *Lepoglava*, ĝi plej ofte asocias pri la malliberejo en tiu urbo, kiu en 2020 festos sian 620-jaran datrevenon. La ĉefan meriton pri ĝia longa ekzisto havas la paŭlanoj. Lepoglava estas lulilo de la scienco, arto kaj kulturo, disvastigataj de la paŭlanoj ekde la jaro 1400. La urbo havas la statuson de la unua kroata universitato.

La komplekso de la iama paŭlana monaĥejo konsistas el granda konstruaĵo kun la interna korto kaj portiko. Laŭlonge de la suda flanko de ĉi tiu konstruaĵo estas alkonstruita Preĝejo de la Senpeka Koncipiĝo de la Beata Virgulino Maria. Pli poste oni konstruis aliajn domojn, kiujn bezonas la nuntempa malliberejo.

La interno de la preĝejo estas ornamita per la pentraĵoj de la paŭlano **Johann Ranger**, kaj ene troviĝas pluraj tomboŝtonoj, interalie tiu de la banuso **Ivaniŝ Korvin** (lat. *Johannes Corvinus*). La tuta inventaro de tiu preĝejo prezentas harmonian tuton kun la ĉefa kaj flankaj altaroj, riĉe ornamitaj per la barokstilaj plastikaj objektoj. Speciale valoraj kaj interesaj estas la ĥorbenkoj de la relikvejo kaj kantoro kun la apogiloj, dekoraciitaj per oleaj pentraĵoj sur ligno de **Johann Ranger**. Ne malpli interesa estas la predikejo kun ligno-reliefaj kaj la altaraĵoj, eksterordinare valoraj oleaj pentraĵoj. En la sakristio (troviĝanta plej proksime al la

prizonaj ĉeloj) estas ankaŭ tre valoraj artaĵoj. La preĝejo de Lepoglava kun sia arkitekturo kaj posedataj trezoraĵoj estas unu el la plej konataj ekleziaj monumentoj en Kroatio, kaj la monaĥeja kaj preĝeja tutaj prezentas unu el la plej gravaj gotikaj, barokaj, arkitektaj kaj kulturartaj kompleksoj en Eŭropo.

En la monaĥejo funkciis la plej karakteriza pentrista skolo en la barokepoka Kroatio. Malgraŭ tio, la tuta komplekso pli konatas pro la pli poste fondita malliberejo. Kiam okazis adaptoj de la iama monaĥejo al malliberejo, oni malkonstruis ankaŭ la eksterajn defendo-turojn. La iaman kulturen brilon nuntempe respegulas nur koncertoj kaj mesoj, kiuj de tempo al tempo okazadas en la preĝejo, kaj la lepoglavanoj demandas sin: Ĉis kiam tiel?

La malliberejo fondiĝis en 1854, kion ebligis la donacdokumento de la 11-a de aŭgusto 1806, kiun subskribis la imperiestro **Francisko Jozefo la Unua**, donacinte la tutan posedaĵon de la eksa Paŭlana monaĥejo, kune kun la preĝejo, al la Kapitulo de Ĉazma, kiel kompenso por iliaj perditaj posedaĵoj en tiu urbo. Pro la senĉesaj atakoj de Turkoj, la Ĉefstabo de Varaĝdin ekposedis la teritorion de Ĉazma, aneksinte ĝin al la tiama Milita limregiono. Pro tio la zagreba episkopo **Maksimilijan Vrhovec** nomumis la kanonikon **Bogdan Anrun** pastro de Lepoglva. Ekde tiam la pastrajn funkciojn ĉi tie plenumis la kanonikoj de Ĉazma.

Rezulte de la komerca kontrakto, subskribita en Varaĝdin la 22-an de junio 1854, la Kapitulo de Ĉazma vendis al la ŝtata



administracio la tutan posedaĵon, ricevitan en 1806 per la donac-dokumento de la imperiestro Francisko Jozefo la Unua.

Lepoglava hodiaŭ estas konata pilgrimejo. La paŭlanoj ne nur konstruis la imponajn preĝejon kaj monaĥejon, sed disvastigis la edukadon, medicinon, arton kaj kulturon en ĉi tiu urbo. Per la dekreto de la aŭstria imperiestro **Jozefo la Dua**, en la jaro 1786 estis malfondita la paŭlana ordeno, kaj la monaĥoj por ĉiam foriris el Lepoglava, sed postlasis la metion de puntofarado en ĉi tiu urbo, kiu nuntempe estas unu el la centroj de puntofarado en Kroatio. Ĉiujare en Lepoglava oni organizas labor-seminariojn kaj internacian punto-festivalon. La faman punkon de Lepoglava oni

faras je aparta maniero „vicigante marteletojn”. Krom Lepoglava, ankoraŭ du kroataj insuloj havas famajn teknikojn de puntofarado Pag kaj Hvar. La punkoj de Pag oni faras per helpo de pingloj, kaj tiuj de Hvar estas farataj el agavo-folioj.

Troviĝante en Lepoglava, oni nepre vizitu ankaŭ la estingiĝintan vulkanon Gaveznica, kiu situas tre proksime al la monaĥejo. Ĝia iama 373-metra ŝtona pinto, hodiaŭ estas grandega truo de la samnoma forlasita ŝtonminejo. Ĉi tie la malliberuloj elfosadis la vulkanan ŝtonon andeziton, tre solidan kaj taŭgan por ŝoseo-konstrudo. Andeziton de Gaveznica priskribis ankaŭ la kroata paleontologo, arkeologo kaj geologo **Dragutin Gorjanović**

Kramberger en 1904. Gaveznica estas la sola fosejo de duonjuvela ŝtono en Kroatio. Temas pri SiO₂ (silicia dioksido), kiu en la jaro 1740 la unuan fojon aperas sub la kroata nomo *ahat kamen* (Esperante: *agato*) en la vortaro *Gazophylacium* de Ivan Belostenec. Proksimume ducent ja-rojn poste estis malkovrita la trovejo de agato apud Lepoglava.

Sur la sama montopito de Gaveznica estis trovitaj la restaĵoj de prahistoria setlejo el la malfrua bronza epoko. Sian nomon la juvelŝtono agato ricevis laŭ la loko de la unua trovejo apud la rivero Achate nuntempe Drillo) sur la insulo Sicilio en Italio.

Se vi havos okazon, nepre vizitu Lepoglavan kaj konvinkiĝu pri ĉio skribita ĉi tie.

Marijan Benc

Amo malantaŭ kamentubo

Kroatoj ĉiujare kun granda intereso sekvas la familian vivon de la cikonia paro Malena kaj Rodan (kromnomita Klepetan). Ĉi tiu cikonia paro ĉiam separiĝas dum vintro. Rodan forflugas al varmaj landoj, kaj Malena atendas lin fidele malantaŭ la kamentubo sur la tegmento en la vilaĝo Brodski Varoš. Tamen, pasintjare tiu ĉi amrakonto de kroataj cikonioj preskaŭ finiĝis.

Malena restas en la familia nesto ankaŭ vintre, ĉar en 1993 ŝi estis vundita de ĉasisto. Ŝi ne eltenus longan flugon al sudo de Afriko. Pri ŝi zorgas Stjepan Vokić, kiun Malena absolute fidas. Li eĉ supreniras ĝis la nesto sur sia tegmento. Rodan, post sia reveno, ĉiujare okupiĝas pri edukado de siaj birdidoj, instruante al ili flugadon.

Antaŭ sep jaroj Rodan revenis al Malena nur tri tagojn post la foriro kaj pasigis la vintron en Kroatio. Sed pasintjare li ne hastis. Antaŭ ol li povis reveni el ĉirkaŭ 13.000 kilometrojn fora vintrejo, alia cikonio provis svati Malenan. Kaj ŝi cedis al la entrudulo kaj eĉ demetis al li ovon. La lokuloj tiam agnoskis la malvenkon de Rodan, estinte konviktaj, ke li jam ne revenos.

La 3-an de aprilo 2017 ĉe la fejsbuka profilo de la cikonia paro (<https://www.facebook.com/KlepetanIMalena/>) oni konstatis, ke Rodan bedaŭrinde ankoraŭ ne revenis, kaj la 12-an de aprilo oni jam voĉdonis, ĉu Rodan estas krimulo aŭ heroo. Tiumomente malantaŭ la kamentubo okazis jam vera am-dramo.


La fidela Rodan tamen denove revenis al sia Malena, sed kun dusemajna prokrasto. Kaj kiam en la nesto ĉe Malena li trovis konkuranton, li tuj „donis al li la lecionon”. Li detruis la neston kaj ovojn, kiuj jam estis en ĝi. Ŝajne, li faris lokon por la novaj, ĉar li kun Malena interpacigiĝis, kaj – laŭ la kroata taggazeto *Večernji List* – ili amoris.

Pasintjare Rodan verŝajne mlfruis pro la vetero. „Cikonioj uzas leviĝantajn varmajn aerfluojn dum la flugo, kaj ĉi tiuj simple povis esti nehaveblaj. En tia kazo cikonioj restas sur malsekaj herbejoj, kie ili provas trovi manĝaĵon kaj atendas pli bonan veteron” – klarigas la ornitologino Zuzana Karlíková.

Tamen, la malfruon povis kaŭzi ankaŭ la aĝo de Rodan. En la printempo de 2014 *Večernji list* informis, ke li estas 30-jara, kio estas respektinda aĝo por cikonio. Cikonioj kutime vivas inter dudek kaj tridek jarojn.

Ŝajnas al mi, ke Klepetan donis al homoj sekvindan ekzemplon pri fideleco al sia partnerino.

Adam Wilkus



Nikola Golić (1935-2018)

Bjelovara esperantista societo perdis ankoraŭ unu el siaj aktivaj membroj. La 15-an de majo 2018 forpasis Nikola Golić el Veliko Trojstvo.

Nikola Golić naskiĝis la 28-an de oktobro 1935 en la vilaĝo Čanak en la regiono de Lika, kiel filo de Marica kaj Nikola Golić. En Karlovac li finis gimnazion, laboris en Veliko Trojstvo kiel poŝtoficisto, kaj dum plenaj kvardek jaroj (de 1959 ĝis 1999), li estis estro de la tiea poŝtoŭicejo. En 1999 li emeritiĝis.

Esperanton li lernis en 1955 kiel memlernanto surbaze de lecionoj el *Omladinske tjedne novine* (Junulara semajna gazeto), sed neniam faris ekzamenojn. Li estis membro de Esperanto-societo en Bjelovar inter 1960 kaj 1970, kaj dum tiuj jaroj li estis aparte aktiva kiel esperantisto.

Li ĉeestis malfermon de la fama Esperantista kampadejo en Primošteno (1960), kaj ekde tiam ĉiujare ĝis 1970 li partoprenis la tieajn seminariojn. Li partoprenis ankaŭ Esperanto-seminaron en Valbandon apud Fažana kaj estis regula vizitanto de Internaciaj



Junularaj Esperantistaj Renkontiĝoj en Germanio: Hamburgo (1967), Kolonjo (1968) kaj Marburgo (1969). Dum unu el tiuj vojaĝoj li renkontis junan esperantistinon Monika el Maŭricio, kaj post tri jaroj da korespondado ili geedziĝis en ŝia hejmlando. Post la geedziĝo ili translokiĝis al Veliko Trojstvo en Kroatio, kie ili kune vivis ĝis la lasta tago de lia vivo.

Vivante en malgranda vilaĝo, li estis plene dediĉita al sia poŝtista profesio kaj dum certa parto de sia vivo Nikola estis izolita esperantisto, sed li konservis tre bonan lingvoscion per korespondado kaj legado.

Dum pluraj jaroj li estis membro de Universala Esperanto-Asocio kaj leganto kaj abonanto de *Esperanto-revuo* kaj aliaj gazetoj.

Li reaktiviĝis okaze de la 9-a kongreso de kroataj esperantistoj, okazinta en Bjelovar en majo 2011, kaj tuj poste, la 10-an de septembro 2011, li kaj lia edzino Monika estis en la grupo de la refondintoj de Bjelovara Esperantista Societo kaj post la fondiĝo ĝiaj regulaj membroj.

Ili ĉiam kune vizitadis societajn kunvenojn, aranĝojn kaj festojn kaj kelkfoje vojaĝis kun la samsocietanoj, malgraŭ malboniĝinta sanstato. La lastan fojon ili kune partoprenis la pasintjaran festivalon INTER-FEST.

Nikola estis agrabla, modesta, pacema kaj pacienca homo, nia veterano, kiu forpasis en la aĝo de 83 jaroj.



Maldekstre: Nikola kaj Monika dum sia geedziĝo en Maŭricio.

Supre: Monika kaj Nikola dancas dum la festado de Zamenhofa tago en Bjelovar.

Ni kreu la Internacian vojon Esperanto

Tra la mondo ekzistas multaj famaj naciaj aŭ internaciaj vojoj, kiel ekzemple la Vojo de Sankta Jakobo de Kompostelo por pilgrimantoj, la Vojo 66 en Usono kun 3.945 kilometroj de la orienta ĝis la okcidenta bordoj por motorbiciklantoj, la Vojo Rikardo Leonkoro por vizitantoj de la kultura kaj arta heredaĵoj, la franca Nacia Vojo 7 kun siaj belaĵoj, la Vojo Via Domitia kiel la unua vojo ligante Alpoj kun Pireneoj, ktp.

Mia ideo estas krei la internacian vojon Esperanto por esperantistoj, kiuj volas viziti ZEO-jn en diversaj landoj. ZEO-j ekzistas jam delonge, sed ili estas nek sufiĉe konataj, nek uzataj por reklami Esperanton.

Mi invitas vin pripensi kiel valorigi ZEOjn por krei la internacian vojon Esperanto?

Eble ni povus publikigi libreton kun ĉiuj ZEOj de la mondo kaj fari pasporton, subskribatan de la turismaj oficejoj aŭ urbaj aŭtoritatoj?

Tiel la vojaĝantoj havus belegajn memoraĵojn pri siaj vojaĝoj, kaj Esperanto estus pli konata kaj pozitive traktata en neesperantistaj institucioj.

Se vi havas aliajn ideojn, bonvolu skribi al la redakcio aŭ al: Isabelle.Nicolas2@gmail.com

Konstrulaboroj ĉe DEC startos en junio



Ĝis la komenco de majo oni kolektis proksimume du trionojn de la bezonata sumo por komenci la ĉi jarajn konstrulaborojn en la sidejo de DEC. Kvankam la sumo de 11.000 eŭroj, bezonataj por 2018, pasintjare ŝajnis iom tro granda kaj preskaŭ neatingebla, okazis kelkaj agrablaj momentoj, dum kiuj pluraj esperantistoj montris sian grandan subtenon al la kampanjo *Por deca hejmo de DEC*. Verdire, ne kolektiĝis la sumo, kiun planis kolekti Unuiĝo de Zagrebaj Esperantistoj per vendo de Briko-kuponoj, ĉar ĝi atingis apenaŭ kvaronon de la planita, sed ankoraŭ ne estas malfrue, ke ni ĉiuj subtenu tiun planon kaj antaŭ la jarfino kolektu la planitajn 2.200 eŭrojn.

La ĝisnuna neplenumiĝo de la monokolekta kampanjo tamen ne influis negative la ĉi jaran planon. La 8-an de majo al DEC estis liverita la unua parto da la konstrumaterialo (cemento, ferstangoj kaj ferretoj, brikoj, fertraboj, kalko, gruzo ktp). Laŭplane, antaŭ la fino de majo devis veni la unuaj konstruistoj, sed pro diversaj kialoj la laborkomenco prokrastiĝis al junio.



Nian **ROZON** ricevas instruistino **Anita Res** (neesperantistino) el la Elementa Lernejo *Mato Lovrak* el Veliki Grđevac (Kroatio), kiu estis motoro de la grupo da infanoj-ilustristoj de la Esperanta eldono de *La trajno en la neĝo* (romano de la porinfana kroata verkisto Mato Lovrak). Antaŭ nelonge ŝi skribi al ni, ke ŝi volas prezenti tiun projekton kiel ekzemplon de bona praktiko, kiun ŝi volas dividi kun siaj gekolegoj instruistoj. Laŭ ŝia opinio, ĝi estas bonega ekzemplo, kiu meritus esti prezentita al edukaj fakuloj landnivele.

KRESKO monata informilo

Eldonas:

Unuiĝo de Zagrebaj Esperantistoj (UZE),
Jarunska 6, 10000 Zagreb

Retadreso de la redakcio:

zagreba.esperantisto@gmail.com

Redaktas: Josip Pleadin

Kresko aperas en la lasta tagdeko de ĉiu monato.

***Kresko* estas libere distribuebla,
kopiesbla kaj citebla.**